MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

E

4

1972

3,— Ft
— 50 $

ĈU VI ŜATAS VIAN AŬTON?

AĈETU LA AGIP-OLEON!

BUDAPEST

SOPRON

RICEVEBLA ANKAŬ EN HUNGARIO ĈE ĈIU IOM GRANDA BENZINSTACIO DE

AFOR

ÁFOR
BENZIN-OLAJ

HEGYESHALOM

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII, Kenyérmező utca 6.

XII-a jaro, 1972. 4-a numero
Numero pri Literatura Mondo

ENHAVO

V. Benczik: Jubileo de Literatura Mondo 1

K. Kalocsay: La tri vivoj de Literatura Mondo 4

L. Kökény: La libroeldonagado de Literatura Mondo 6

Titolpaĝoj de Literatura Mondo (fotomuntaĵo).

György Moldova: La filino de la pordisto. Tr. K. Kalocsay . . 8

J. Szekeres: Panoramo 10

Karlo Nagy: Aluminio, la hungara arĝento 12

L. Lesznai: Capitroj de la hungara muzikhistorio 14

E. Fenyvesi: Milito de kamparanoj (Gy. Dózsa naskiĝis antaŭ 500 jaroj) 16

M. Gergely: József Somogyi . . 17
József Somogyi: Dózsa (Skulpturo kaj desegnaĵo) 16, 17

Tibor Újlaky-Nagy: Post Munkeno 18

Lajos Tárkony: Revuo de revuoj 20

Ada Csíszár: Alfonso Pechan fariĝis 70-jara 22

Sándor Weöres: Poemoj. Tr. K. Kalocsay 24

P. Balkányi: Historia romano de Esperanto 24

Zoltán Zelk: Sinjorinoj en kafejo. Tr. Márton Fejes 25

La Babelo de la scienco 25

Ĉu ni estas malfacilaj? 26

RO-LO,-gng-: Recenzoj . . . 28

Leterkesto, Korespondi deziras . 30

FERI: Pri Literatura Mondo (Krucvortenigmo) 31

Sur la kovrilpaĝo — József Somogyi: Dózsa. Foto: Viktor Gábor

Jubileo de Literatura Mondo

La Esperanta literaturo, kiu nur apenaŭ transvivis la tuteŭropan militon, en la jaro 1922 havis veran feston, kiu konvinkis eĉ la dubemulojn pri ĝia ekzistorajto kaj estonto. Post la atutaj poemlibroj — *La Unua Ondo* de Miĥalski, *Mondo kaj koro* de Kalocsay kaj *Preter la vivo* de Baghy — oktobre de tiu ĉi jaro eliris la unua numero de prestiĝa kultura revuo, de *Literatura Mondo.* En la tiama situacio certe multaj pensis pri efemera entrepreno, ja Eŭropo — kiu en tiu tempo estis ankoraŭ preskaŭ ekskluziva patrujo de la Esperanto-movado — ne ŝajnis sufiĉe forta por vivigi ambician kulturan revuon.

Eble la dubo ne estis tute senbaza, sed la aŭdaca gesto de la eldono iel impresis la esperantistojn, kaj la revuo vivis sen interrompo kvar jarojn: ĝin povis sufoki nur la mondekonomia krizo, kiu bankrotigis ankaŭ centojn de multe pli solidaj entreprenoj.

La numeroj de tiu ĉi unua periodo por la nuna leganto eble efikas iom arkaikaj, sed ni ne forgesu: ĝuste tiu ĉi revuo kaj ĝia libroeldonejo estis en la historio de nia kulturo tiuj faktoroj, kiuj eble plej multe kontribuis por levi la nivelon de nia literaturo al la nuna relativa alteco, nur dank' al ĝia preskaŭ tridekjara strebado ni trovas ĝiajn unuajn numerojn iom eksmodaj.

Kompreneble, ili estas tiaj nur, se ni komparas ilin al niaj nunaj produktoj. Sufiĉas trafoliumi iun ajn periodaĵon de la dudekaj jaroj, aŭ des pli de la antaŭmilita tempo, kaj la grandega diferenco tuj frapas al ni la okulojn. Plej multe *Literatura Mondo* sendube ŝuldas al la du freŝaj talentoj de la Esperanta literaturo, Kalocsay kaj Baghy, sen kiuj la nova revuo dronus inter la tiutempaj plataĵoj. Dum longa tempo nur iliaj kontribuaĵoj reprezentis la veran literaturon sur la paĝoj de la revuo, kaj dank' al ilia redaktora strebado la cetero estis bone kribrita kaj plaĉe prezentita.

La ekonomia krizo mortigis la revuon, sed apenaŭ la situacio iomete pliboniĝis, ĝi jam sin levis el la polvo, pli ĝuste levis ĝin unu el la plej valoraj personoj de la historio de la Esperanto movado: *Vilmos Bleier.* Estas granda la tento nun deflankiĝi de la temo signita, kaj skribi pri tiu unika homo, sed anstataŭ laŭdi la homon, ni observu lian verkon.

Literatura Mondo reaperas en la jaro 1931, kaj en tiu ĉi dua periodo ĝi jam vere fariĝas la revuo numero unu en la tuta kultura merkato. Kalocsay rekolektas la kunlaborintojn de la unua periodo, al kiuj aldoniĝas ankaŭ ne malmulte da novaj homoj. Oni povas konstati sen ia ajn rezervo: ĉiu valora aŭtoro verkinta en la tridekaj jaroj, estis pli-malpli forte ligita al *Literatura Mondo.*

Literatura Mondo tute ne estis „fermita" revuo, kiel siatempe asertis multaj. Estis invititaj publikigi en ĝi ĉiuj esperantistaj verkistoj, poetoj, tradukistoj, kaj vere, ĝia kunlaborantaro estis tre vasta. Malgraŭ la tre forta cenzuro de la tiama Hungarlando, la revuo publikigis ĉion, kion la redaktoroj konsideris literature valora. Ni scias el la rememora artikolo de Szilágyi, ke ofte la revuo havis du, preskaŭ tute malsamajn variantojn: unu por la hungaraj



Julio Baghy



Pál Varsányi

Karlo Bodó



aŭtoritatoj, kaj alian kompreneble por la abonantoj. Nature, okazis ke la revuo rifuzis publikigi alsenditan novelon aŭ poemon, sed tia sorto trafis nur diletantaĵojn: la redaktoroj prijuĝis ĉies verkojn kun egala severo, nenia movada meritpleneco moligis ilian koron. Dank' al tiu konsekvenca laboro edukiĝis ĉirkaŭ la revuo aro da talentaj literaturistoj, kiel ekzemple: *Bodó, Tárkony, Adamson, Dresen, Waringhien, Reto Rossetti, Sturmer, Szilágyi* kaj eĉ *Auld* (tiu lasta en la tria periodo). (Parte ili klasiĝas kiel membroj de la Budapeŝta Skolo, pri kiu en la ISU de la 51-a UK en Budapeŝto tiel kompetente prelegis Waringhien.) Baldaŭ por ili — ne nur por Kalocsay kaj Baghy — ne sufiĉis la spaco, kiun la revuo povis oferti, kaj por kontentigi la novajn bezonojn — dank' al la aŭdaco de Bleier — fondiĝas la libroeldonejo de la revuo. Kune kun ĝi la revuo jam havas por nia kulturo ne malpli gravan signifon, ol Hachette havis kun *La Revuo* kaj sia libroeldonado en la antaŭmilita periodo.

Pri la eldonejo de Literatura Mondo oni povus skribi apartan artikolon, ja Bleier ne estis nura komercisto, sed kune kun Kalocsay eble la unuaj kulturpolitikistoj de nia movado. Ĉe Literatura Mondo aperis pluraj bazaj libroj de nia kulturo: *Enciklopedio de Esperanto,* kiun Haupenthal karakterizas en 1968 „senkompara kaj monumenta verko"; *Parnasa Gvidlibro,* kiu finfine klarigis al la esperantista publiko, kio estas poemo; *Plena Gramatiko,* kies konstatoj grandparte fariĝis leĝoj de nia komuna lingvo; *De paĝo al paĝo* de Tárkony, kiu estas la unua vere valora literaturkritika verko kaj la feliĉe jam plurfoje reeldonita *Lingvo, stilo, formo.*

Meritas apartan mencion la grandiozaj naciaj antologioj, la ĉehoslovaka, hungara kaj svisa, sed kompreneble estas gravegaj ankaŭ la aperintaj originalaj beletraĵoj, inter kiuj elstaras la *Strečita kordo* de Kalocsay, *Hura!* de Baghy, kaj *Homoj sur la tero* de Engholm kaj la du poeziaj antologioj: *Dekdu poetoj* kaj *Naŭ poetoj.* Ĉi tie ni ne forgesu mencii ankaŭ la valoregan literatur-organizan laboron de la eldonejo: ekzemple la supre citita romano de Engholm aperis kiel la gajninto de la unua premio de la romankonkurso de Literatura Mondo. (Simila konkurso ankaŭ nuntempe estus ege necesa; konvena premio certe elvokus almenaŭ du-tri bonnivelajn originalajn romanojn.) La kultur-centran funkciadon de la eldonejo pruvas ankaŭ la anoncita programo de reeldono de klasikaj verkoj — tasko akute grava ankaŭ nuntempe — sed bedaŭrinde la milito malhelpis la efektivigon de la plano: aperis nur la dua romano de Valienne: *Ĉu li?,* stile reviziita de Kalocsay. (Eĉ de tiu ĉi nuntempe oni trovas nur la unuan volumon, la dua mistere malaperis; onidire ĝi eĉ ne atingis la merkaton.) La eldonaĵoj de Literatura Mondo estas senescepte altkvalitaj verkoj: la eldonejo ne timis la financan riskon, kiu akompanas la eldonon de nekonata originala verko — speciale de poezia — aŭ tiun de Esperanta traduko de eĉ nacilingve malmulte konsumata libro. En la agado de la eldonejo realiĝis mirinda kunfandiĝo de arta, literatura kompetento kun financa aŭdaco, komerca sagaco kaj ne laste konscia oferemo.

Karakterize, ke la revuon kaj la eldonejon povis sufoki nur la eksplodo de la dua mondmilito. *Literatura Mondo* — malgraŭ la multaj kaj bruaj atakoj, kiujn ĝi suferis unuavice pro sia lingvoevoluiga strebado — ĝuis la aprobon, fidon kaj apogon de la konsciaj esperantistoj. Legante la tiutempajn gazetojn oni pensus, ke la tuta esperantistaro estas kontraŭ la revuo, nome kontraŭ ĝia „neologismemo", ja eĉ la iama kunredaktoro, la popularega Baghy publike elpaŝis kontraŭ ĝi. Se tiu amaso de negativaj opinioj reprezentus la *veran* opinion de la tuta esperantistaro, certe la revuo kaj la eldonejo ne transvivus la atakojn. Cetere la tiutempan bruon jam kovras dika tavolo da polvo. La lingvo atingis certan etapon de sia evoluo

kaj bezonegis la enfluon de novaj vortoj — tiu enfluo okazis ja absolute tiel, kiel Zamenhol mem antaŭvidis tion — ĉar nur tiamaniere ĝi povis fariĝi adekvata esprimilo por vera literatura arto. Kompreneble ne senescepte ĉiuj vortproponoj de Kalocsay kaj de liaj kolegoj estis plentrafaj, sed ili ja neniam eĉ insistis pri siaj kreaĵoj. La netaŭgaj proponoj dronis en la forgeso, kiel ankaŭ la protestegoj de la miopaj ortodoksuloj. Do, ni povas konstati, ke certa — kaj ne sensignifa — parto de la esperantistaro komprenis la celojn de la strebado de la revuo, kaj dank' al ili *Literatura Mondo* povis renaskiĝi en 1947 jam la duan fojon.

Foliumante la jarkolektojn de la tria periodo oni rimarkas, ke la revuo jam komence posedas ĉiujn virtojn akiritajn en la intermilita tempo: vastan kunlaborantaron, bonan kritikan (intence mi ne uzas la vorton *recenza,* ja pri ĉiu signifa verko aperis pritakso pli inda, ol niaj nuntempaj recenzoj) rubrikon, lerte elektitajn beletraĵojn. La kontraŭfaŝisma atmosfero de la postmilita Eŭropo siavice multe kontribuas al la plivastigo de la horizonto de la revuo: aperas amaso da tradukoj el la pli frue malmulte prezentita rusa kaj soveta literaturoj, kaj estas tre atentindaj ankaŭ la erudicie verkitaj ampleksaj eseoj pri la plej diversaj kulturaj temoj en la rubriko *Observo.* La revuo donas specialan atenton ankaŭ al la abunda prezento de la burĝa kontraŭfaŝisma literaturo. Faras aparte valoraj tiujn ĉi postmilitajn jarkolektojn la fakto, ke ili enhavas la novajn, tre valorajn verkojn de Baghy, Tárkony kaj Kalocsay. Kompare al la unuaj du jarkolektoj senteblas nun konsiderinda politika radikaliĝo, kvankam foje-foje englitis verkoj — eĉ el la plumo de la granduloj — kies entuziasmo malhavas decan artan vestoŋ; tiu politike radikala originala literaturo bedaŭrinde ne povis plene disflori, ja en 1949 ankaŭ *Literatura Mondo* fariĝas viktimo de la stalinisma miopeco.

Ĝia malapero estis gravega perdo por nia literaturo: certe neniu volos kontesti tiun ĉi aserton. La revuo ĉesigis sian aperadon, ankaŭ la eldonejo ne plu aktivas, tamen ĝia influo al nia literaturo estas kvazaŭ palpe sentebla eĉ nun, kvindek jarojn post la apero de la unua numero. Ja unuavice dank' al tiu revuo ni havas krom la menciitaj jam gravaj, bazaj libroj la verkaron interalie de Baghy Tárkony kaj de la grandioza Kalocsay — al kiu lasta kompreneble ankaŭ la revuo mem ŝuldas ne malmulte.

Multfoje oni skribis jam pri tio, ke ne nur nia movado, sed ankaŭ nia kulturo bezonas centran organon. Tio estis antaŭ la unua mondmilito *La Revuo,* kaj ĝian taskon en 1922 transprenis *Literatura Mondo,* en sia dua periodo inkluzive la libroeldonadon. Dank' al la sinofera laboro de Juan Régulo la postmilita eldonejo-posteulo de *Literatura Mondo* jam estas 20-jara, tamen post 1949 neniu el la tute ne malindaj revuoj-posteuloj — *La Nica Literatura Revuo, Monda Kulturo, Norda Prismo* ktp. — sukcesis konkeri en nia literaturo rolon similan al tiu de *Literatura Mondo.* Primemorante la duonjarcentan jubileon de la ekapero de tiu ĉi revuo-giganto — en la Internacia Jaro de Libro — ni ne forgesu ankaŭ pri tiu ĉi fakto malmulte ĝojinda.

Kiel ni jam menciis, *Literatura Mondo* metis stampon neniam forviŝeblan sur nia kulturo: ĝia efiko ankoraŭ longe estos sentebla. Tamen, ĝia efiko ne estas senpera, ja ĝiaj numeroj jam ne aĉeteblas en la libroservoj. Estus tre utile, se nun, okaze de la jubileo iu entreprenus kompili ĝian *repertorion,* t. e. kompletan aŭ almenaŭ selektitan enhavtabelon de ĉiuj tri periodoj — pli inda omaĝo estus nur libroforma aperigo de la plej valoraj kontribuaĵoj, aperintaj en la revuo.

Vilmos BENCZIK



Koloman › Kalocsay



Lajos Tárkony

Ferenc Szilágyi

La tri vivoj de "Literatura Mondo"

Kiam mi provas rememori pri la fondo de L.M., traflugante pense tempon da (bagatelo!) kvindek jaroj, mia unua impreso estas mallumo. Mallumo de malbone lumigitaj stratoj, mallumo de lando postmilita, postrevolucia, blankterora, mallumo de senvaloriĝanta mono, mallumo de cerboj anti-internaciismaj, mallumo de etoso de mondo-fino. Inter tiaj cirkonstancoj, E-o tamen havis grupejon en la Socia Muzeo, dank' al la liberala animo de ties direktoro György Gortvay, kaj dank' al la fervoro de amiko Balkányi, kiu, kun sia kutima persisto, obstino kaj pacienco, trovis tiun eble ununuran eblon por akiro de ejo. Tie ni kunvenis regule unu fojon semajne, kaj, por allogo, ni klopodegis zorgi pri altira programo. Inter aliaj ni prezentis poezion de diversaj popoloj, uzante la tradukojn de Grabowski kaj aliaj, kaj ankaŭ la hungarajn versajn tradukojn de tiuj tradukoj. Mi memoras pri pola, kataluna, franca kaj finna poemvespero; postrestaĵo de ĉi lasta estas „La renkonto de kantoj" legebla en mia Strečita Kordo. Tiujn kunvenojn vizitis pluraj freŝaj fortoj: *L. Totsche, J. Mátéffy, A. Bayer, J. Werner, P. Varsányi* kaj aliaj, kaj tien venis verve, nigrobrune, okulfulme kaj larĝbrakume *Julio Baghy,* rekte el la Siberia milit-kaptiteco. Poste baldaŭ li kreis por si apartan propregan grupon, kun propra himno, kaj en nia grupo de tiam li estis nur bonvena, elita gasto.

Nu, post unu tia kunveno *Balkányi* komunikis al ni, jam sur la mallume lumigita strato, ke lia konato, *Teodoro Schwartz,* iama militkaptito, nun bonhava advokato kaj animita esperantisto, estas preta financi E-an revuon literaturan, eĉ belan kaj ilustritan. Tio, momente, ŝajnis al ni fabelo. Sed baldaŭ ekfunkciis nia fantazio kaj konvinkis nin, ke tia revuo devas havi bonegajn ŝancojn. Antaŭ 1914 ekzistis ja du renomaj internaciaj revuoj en E-ujo: „Lingvo Internacia" kaj „La Revuo" kaj ili, ne tre amikaj inter si, bone prosperis. Nun la ĉasteritorio estas tute libera, ni akiros do riĉan predon da abonoj. Poste la Ĉefo, T. Schwartz, pentris por ni eĉ pli belajn perspektivojn, kiujn li bazis sur la tiama deviza stato. Laŭ lia kalkulo, se ni havus 5000 abonantojn, ni povus aperigi la revuon duonmonate sur 48 paĝoj ĉiunumere. Neniam falis tia lumo en tian mallumon, kiel por ni tiam.

Fakte, la fabelo realiĝis: T. Schwartz disponigis la monon, ni eklaboris, kaj en oktobro de 1922 aperis la unua numero de Literatura Mondo (baptita tiel de P. Balkányi).

La numeron ni kunmetis nur el la verkaĵoj de la redaktantaro. La hungaran literaturon reprezentis nur unu Heltai-noveleto en la traduko de *A. Bayer;* karnavalan romantikon elspiris la unuaktaĵo „En Maskobalo" de *J. Baghy,* romantikon de e-ista amo la novelo de *Balkányi* (miaopinie inda fariĝi pli konata), ekzotikon la fabelo de la Ĉefo (sub pseŭdonimo Teo Melas); la pionira generacio prezentis sin en la komenco de la „Rememoroj" de akademiano *P. Lengyel.* Mi donis poemtradukojn el kvar lingvoj por la demonstro de nia internaciemo.

Apenaŭ estas imageble, kun kia animstreĉo ni vizitis ĉiuvespere la redaktejon kaj trarigardis la poŝton, serĉante leterojn aprobajn-kuraĝigajn, manuskriptojn, signojn de resono kaj rekono en la E-aj gazetoj. Dum tiuj serĉadoj ni jen gajiĝis, jen senreviĝis. Gajiga estis la entuziasmo, kun kiu verkistoj-esperantistoj nin salutis kaj certigis pri kunlaboro; ekz-e *Louise Briggs, J. Grau Casas, Hilda* kaj *Helmi Dresen, N. Hohlov, Emma Osmond, Raymond Schwartz, Leono Zamenhof,* senrevige estis, ke la diversaj E-aj presorganoj faris kontraŭ ni kvazaŭ komploton de silento. Ankaŭ la tro iom-post-ioma plimultiĝo de la abonoj ne kontentigis nin.

Post la kvaronjaro en 1922, en 1923 la revuo aspektis jam tute plenkreska kaj, laŭ la kunlaborantaro, plene internacia. Elformiĝis la rubrikoj: Disputo, Literatura Observo, Binoklo, vastaj Recenzoj. Ĉe ni debutis J. E. Leppäkoski, la posta tradukanto de Kalevala. Regule kontribuis Raymond Schwartz kun spritaj versaĵoj. Memorinda okazaĵo estis la literatura vespero, kiun la revuo prezentis en la Nürnberga Universala Kongreso. Ni surscenigis unuaktaĵon de Heltai, *Sárossy* faris furoron per sia kantado, *Irena Noiret* brilis kaj konkeris. La lerta reĝisorado de Baghy vekis la impreson, kvazaŭ ludus profesiaj aktoroj parolantaj la lingvon sur patrinlingva nivelo. Esperanto ekvivis multkolore kaj diversfacete sur la scenejo.

Tio ĉi tamen ne multe helpis la financojn de la revuo, malgraŭ ke ĉi tiu evoluis pli kaj pli interesa kaj instrua; mi menciu nur la serion de belartaj artikoloj fare de *Paŭlo Varsányi,* en kiuj li ĉiu-numere prezentis grandan pentriston aŭ skulptiston kun ilustraĵoj. Ni revis pri 5000 abonantoj kaj apenaŭ ni sukcesis atingi la dekonon de tiu nombro. Kaj tiam ni kreis novan specon de literaturo: dorsflanke de la titolpaĝo ni komencis publikigi tekstojn, admonantajn por abono kaj abonanto-varbo. Ni enmetis en tiujn tekstojn nian tutan animon, uzante indignon majestan kaj spriton facilan, lamentojn larmajn kaj promesojn brilajn, sentimentalon, profetan koleron, ironion kaj sarkasmon. Eldonite, tiuj helpokrioj estus ekscita legaĵo pri dramo de revuo pereanta kaj voleganta vivi, ĉar inda vivi. La Ĉefo iun tagon deklaris, ke jam nur dum unu jaro li povos kovri la deficiton; ĉi tion ni sciigis al la legantoj kun la kutima vea vervo. La jaro pasis, la deficito ne ĉesis. Tiam la eldonon transprenis Hungara E-Instituto, ĉi-cele fondita de *Vincento Tóth.* Li eldonis ankaŭ „La Tragedio de l'Homo" esperante de tio financan apogon. Ni mem vidis la aferon jam senespera, kaj ni kasandris prave. Baghy eltondris ankoraŭ unufoje sur la kutima varbopaĝo: „Ĉu dormas aŭ mortis la konscio de la esperantistaro?" La tondro forsonis en la dezerto, kaj la revuo ĉesis en 1926. Jen la trista historio de la unua periodo.

***

La renaskiĝon post kvin jaroj oni povas danki al Vilmos Bleier, la Providenculo. Mi skribis pri li detale en H. V. 1968/4, kaj lian eldon-agadon L. Kökény pritraktos ĉi-numere.

Kiam Bleier invitis nin (Baghy, Kalocsay. Szilágyi, Bodó, Totsche) al la unua redakta-eldona kunsido, kaj ni aperis tie ekscitite, li eksplikis al ni ke L. M. en si mem ne ŝajnas viv-

Karikaturo de Stefano Barta pri la redaktoroj de Literatura Mondo. (Aperis en L.M.)

kapabla, sed li tamen ekirigos ĝin, por ke ĝi estu la bazo, kvazaŭ blazonŝildo de lia eldona agado. Montriĝis, ke lia kalkulo estis ĝusta: la revuo famigis la eldonejon, la eldonejo vivtenis la revuon.

Se la unuan periodon mi povus karakterizi kiel „heroan vegetadon", la duan markis ĝojebrio de reviviĝo, impeto, ekspansio.

Kortuŝis nin la granda ĝojo kaj amo, kun kiu multloke multaj bonvenigis la reviviĝinton; nun ni vidis, ke oni ŝatis ĝin multe pli, ol estis konkludeble el la abonula nombro. *Waringhien* tradukis por ni salute la soneton de Heredia pri la Vergilia ŝipo, kun evidenta aludo, ke nia ŝipo ja ne dronu denove. Anoncis sin niaj fidelaj amikinoj estonaj, *Helmi* kaj *Hilda Dresen* kaj novaj amikoj el Britujo, stabo de „International Language": *Sturmer, Newell, Johnson, Venture, Heywood.* Kaj ankaŭ alilandaj varbiĝis, precipe poetoj, tiel ke poste mi povis kolekti du volumetojn el la poemoj de 21 poetoj.

Sed mi ne povas trababili la tutan periodon, tial mi ne faras detalan kronikon sed mencias nur okazaĵojn venintajn hazarde en mian kapon. Tia estis ekz-e, ke ni aperigis numerojn dediĉitajn al la literaturo kaj arto de po unu popolo. ekz-e latvan kun kontribuoj de *N. Kurzens;* svedan kun poemtradukoj de *Magda Carlsson;* polan kun reaktivigo de *L. Belmont,* italan, jugoslavan ktp.; tio iel paralelis al la eldonataj Antologioj (hungara, ĉehoslovaka, svisa).

Granda sensacio estis, kiam Baghy eksiĝis el la redaktado pro kontraŭeco kun Bleier. Ili ambaŭ estis pravaj: Baghy rajte postulis, kaj Bleier, kiu vivis finance de unu tago al la alia, simple ne povis doni. Tamen, Baghy post tiu rompo ankoraŭ unu jaron verkadis por L. M. sian rubrikon „Mia Angulo", partoprenis kun la stabo de L. M. en la jubilea kongreso en Varsovio, kaj ankaŭ poste aperigis poemojn en la revuo. Sed, malfeliĉe, li verkis parodian poemon kun aglomero de neologismoj el la Parnasa Gvidlibro, kaj postmetis noton, el kiu oni povis ellegi, ke la kaŭzo de lia eksiĝo estas la neologismemo de L. M. Poste li malkonfirmis tiun ŝajnon, sed tamen lia poemo elvokis tutan krucmiliton de ortodoksuloj. Gvidloke batalis la japanoj, eldonante sian faman (ĉu ankoraŭ faman?) Rezolucion, kiu parolis pri „okcidenta vort-imperialismo". Cetere, la batalon gvidis la hungaro *J. Major,* vivanta tiam en Japanujo. La japanoj poste tute ne montriĝis ortodoksaj: ekz-e iliaj vortaroj zorge registras preskaŭ ĉiun vorton novan.

La alia evento estis la apero de la L. M.-aldonaĵo, la kvaronjara *Lingvo Libro,* kiu okupiĝis pri la E-aj libroj, revuoj, gazetoj kaj pri esperantologiaĵoj. Tie multe kontribuis *G. Karczag, F. Szilágyi, N. Kurzens, K.R.C. Sturmer, G. Waringhien* kaj aliaj diversnaciuloj. Tie aperadis la malice pikaj artikoletoj de *M. Alice Pik.* Tie daŭris longe la diskuto pri la Plena Gramatiko. Kiam en 1935 aperis ties unua volumo, Bleier sendis ekzempleron al ĉiuj akademianoj, petante ilin pri kritiko, utiligota en la dua eldono. Alvenis kritikoj de *Lidja Zamenhof,* de la zamenhofologo *W. Bailey,* de *Leo Belmont,* de *Vicente Inglada,* de *Marcelé.* Bedaurinde, ni ne multe profitis de ili: iliaj riproĉoj plejparte baziĝis sur nekompreno aŭ miskompreno aŭ sur la tezo, ke ĉiu regulo katenas la lingvon, do estas forĵetenda. Ili donis al mi okazon larĝe ekspliki la diversajn problemojn, sed la dua eldono de P.G. (1938) apenaŭ estis influita de ili.

Malgraŭ la financaj malfacilaĵoj, la revuo staris sur firma bazo: sur la neŝancelebla optimismo, eksterordinara komerca lerto, eltrovemo kaj moviĝemo de Vilmos Bleier. Kaj tial ĝi ne mortis, sed estis mortigita (de la milito de Hitler).

***

La tria vivo de L. M. komenciĝis en 1947 dank' al la financado kaj administrado de *Béla Berceli,* frato de Vilmos Bleier. Al la ĝojebrio de la reviviĝo nun aldoniĝis ankau tiu de la liberiĝo: en la enkonduka artikolo mi salutis tiun liberecon kiel „fonton de pli intensa, pli vivoproksima, pli vasthorizonta literatura riĉo."

En la redakta komitato troviĝis *F. Szilágyi, L. Tárkony-Totsche, Gaston Waringhien;* ĉefkunlaboranto estis *Julio Baghy.* Reaperis la tradiciaj rubrikoj: Diskuto, Recenzo, Lingvo, Observo.

Kiel en la dua periodo, ankaŭ nun ni strikte kontaktiĝis kun britoj: *Reto Rossetti, William Auld, J. S. Dinwoodie;* ili fariĝis diligentaj kunlaborantoj — la skota skolo! Ni ĝojis pri la kontribuoj de *P. Thorsen, M. Lukáš, Roger Bernard, G. Saville, Hilda Dresen, T. Pumpr, Brendon Clark,* la japana *Kuriso,* la ĉehaj *K. Pič* kaj *J. Korinek,* — kiel la listo montras, rapide ni fariĝis tute internaciaj, modeloj de paca kunekzistado.

Bedaŭrinde ĉio ĉi daŭris nur ĝis la 16-a numero. Sekvis la malvarma milito kaj, paralele kun ĝi, la personkulta atmosfero: la spiro ekmankis al L. M. Sed post kvin jaroj ree ekviglis la E-a movado, eĉ kun oficiala subteno. Kaj en 1961 komencis aperi *Hungara Vivo,* en kiu oni povus aŭ volus vidi la kvaran vivon de Literatura Mondo.

K. KALOCSAY

La libroeldonagado de Literatura Mondo

En la historio de E-o havis ĉiam gravan rolon .la eldonantoj-eldonistoj de libroj, gazetoj, revuoj

Unualoke staras *Aleksandro Silbernik*, kiu, kvankam neriĉa — materiale ebligis al sia bofilo *Zamenhof* la aperigon de la Unua Libro kaj Dua Libro de Esperanto.

La hungara *Paŭlo Lengyel*, posedanto de presejeto en Szekszárd, transprenis la eldonon de la gazeto *Lingvo Internacia* kaj aperigis ĝin inter 1900 kaj 1904. Poste en Parizo li kunfondis la *Presan E-istan Societon*.

Grava kaj grandrezulta estis la eldonagado de la grava firmo *Hachette* en Parizo, kiu ekde 1901 ne nur aperigis bonajn E-ajn librojn, inter ili tiujn de Zamenhof kaj Kabe, sed kapablis ilin ankaŭ disvastigi. Tion ĝi faris ĝis la unua mondmilito. Inter la du militoj la germana eldona firmo *Hirt und Sohn* entreprenis eldoni E-ajn librojn, inter ili la gravan „Originala Verkaro" de Zamenhof en la redakto de *Dietterle*. Multaj serio-libroj aperis en la eldono de *R. Mosse*, Berlino.

En la jaroj inter la du militoj E-o disvastiĝadis inter la laboristoj en tiuj landoj, ekz-e en Hungarlando, kie mankis eĉ la formala burĝa demokratio. Tion rekonis la politika ĉefgrupo de detektivoj, kiel montras parto el ilia raporto: „La laboristaj esperantistoj tiun ĉi lingvon, facile ellerneblan kaj relative larĝe disvastiĝintan, jam antaŭlonge metis en la servon de la socialisma movado. Kiel batalilo ĝi bone taŭgas al ilia celado, ĉar, laŭ ilia opinio, la laboristoj povas per ĝi multobligi siajn fortojn kaj pliintensigi sian batalon . . ."

Fakte, Esperanto estis ne malmulte disvastiĝinta inter la hungaraj laboristoj, kiuj lernis, agadis en la grupoj de HESL; kaj en tiuj grupoj la spirito estis pli revolucia ol en la legitimaj socialdemokratiaj organizaĵoj.

En unu tia grupo de HESL ellernis *Vilmos Bleier* E-on en 1922. Baldaŭ li fariĝis ties administranto, propagandisto, mastro de la librovendado. Kaj li fariĝis spertulo ankaŭ en la E-a literaturo. Lia larĝhorizonta spirito travidis la tutan kampon de la E-a vivo. Li sentis, ke memstariĝinte li povus fari multe pli multe. Precipe, ĉar li rimarkis, ke en Budapeŝto troviĝas talentoj: *J. Baghy, K. Kalocsay, K. Bodó, L. Totsche* (Tárkony), *F. Szilágyi, L. Spierer* (Somlai), *L. Halka* kaj aliaj, helpe de kiuj oni povus komenci ion seriozan, eĉ, eble, grandiozan.

Kaj, por doni spacon al tiuj talentoj, Bleier refondis en 1931 la revuon Literatura Mondo, bankrotintan en 1926. Tamen, tio estis nur la starto. Nia multprojekta kaj multpova Vilmos Bleier volis eldoni — preskaŭ sen kapitalo — ankaŭ librojn belajn, valorajn, altnivelajn: beletrajn, popularajn, sciencajn. Kun tiu celo li elpensis kaj realigis diversajn specojn de la propagando. En 1933 li fondis Asocion de Esperantistaj Libro-Amikoj, kies celo estis: doni belajn, bonajn kaj malkarajn librojn al la membroj de tiu AELA. La membroj ricevis en 1933 ses librojn kun 1800 paĝoj, inter ili ankaŭ la unuan volumon de Enciklopedio de Esperanto. Ankaŭ en 1933 Bleier fondis la kvaronjaran Bibliografian Gazeton, kies ampleksan parton okupis detalaj recenzoj. Ekde 1934 la gazeto havis la nomon Lingvo Libro.

Li uzis ĉiujn eblajn metodojn por la disvastigo. Li vojaĝis en pluraj landoj kaj per lertaj oratoraĵoj li pledis por siaj eldonaĵoj.

Dank' al la eldona agado de Vilmos Bleier, daŭranta nur sep jarojn kaj de komenco ĝis fino inter financaj zorgoj, L. M. aperigis gravegajn verkojn de la E-a literaturo kaj lingvistiko. Li eldonis i. a. du originalajn poeziajn verkojn de *Baghy*, tri de *Kalocsay*, po du prozajn verkojn de *Baghy* kaj *Engholm*, po unu de *Newell, Szilágyi, Sturmer* ktp. Aperis la „Infero" de *Dante*, la internacia antologio *Eterna Bukedo*, po unu romano de *Munthe* kaj de *Jelušiĉ*. La *Hungara Antologio, Svisa Antologio* kaj *Ĉeĥoslovaka Antologio* reprezentis gravan riĉigon de nia traduka literaturo. Krome la eldono de la Ĉeĥoslovaka Antologio signifis ankaŭ politikan agon.

Por la E-a stilistiko, metriko, poezio ankaŭ en niaj tempoj estas nemalhaveblaj la *Parnasa Gvidlibro* (Kalocsay kaj Waringhien), la *Lingvo Stilo Formo* (Kalocsay), la eseoj de *Paĝo al Paĝo* (Totsche), por la lingvoscienco la baza verko *Plena Gramatiko* (Kalocsay kaj Waringhien). Ankaŭ la eldono de *Enciklopedio de Esperanto* en du dikaj volumoj apartenas — kune kun la redaktado de la riĉa bildmaterialo — ĉefe al la meritoj de Bleier. La tekstan parton redaktis la subskribinto de tiu ĉi artikolo.

Bleier redaktis la gravan verkon: *Ora Libro de la E-movado*, kaj grandparte al li apartenas la kunmeto de *Arĝenta Duopo* pri Baghy kaj Kalocsay.

Kaj ĉu okazis ŝanĝiĝo en la politika pensado de nia Vilmos Bleier inter tiuj ankaŭ „negocaj" agadoj? Pri tio ni denove citas la politikan raporton de la Budapeŝta Polico: „Vilmos Bleier dum la ekspedado de la revuo Literatura Mondo dissendis presaĵojn pri la bolŝevikaj libroj al la abonantoj kaj mendantoj de tiu ĉi revuo."

Pro la proksimiĝo de la nova mondmilito Literatura Mondo ĉesis en 1938, sed la eldonejo ankoraŭ funkciis, jen en la fora Hong Kong, jen en Italio. Vilmos Bleier mem ekloĝis en Parizo, kaj tie li mortis baldaŭ post la germana okupado la 15-an de Julio 1940.

Liaj eldonitaj libroj estas kaj restos ankaŭ ĉiam trezoroj de la bibliotekoj de Esperanto. Krome estas ankoraŭ nia tasko studadi la libroeldonajn metodojn de tiu ĉi altkapabla libroeldonanto, grava riĉiganto de la tuta kulturo de Esperanto.

Ludoviko KÖKÉNY

LITERATURA
MONDO
1925
BELETRISTIKO
BIBLIOGRAFIO
MAJO 1931
1923
APRILO
NUMERO 4 (7)
DUA
JARO
MONDO
LITERATURA
Dua periode
LITERATURA
LITERATURA MONDO
LITERATURA MONDO

György Moldova

La filino de la pordisto

— *Jes, tre malfacile estas trovi la veran edzinon — komencis Balázs —, kaj certe, kiu do vidis aferon pli komplikitan ol mia edziĝo? Malnova historio, ni estas inter viroj, mi ĝin rakontos.*

En la aŭtuno de 1944 oni min envagonigis kiel junbravulon kaj elportis al Germanlando. Mi eĉ ne descendis de l'trajno kaj jam trafis en usonan militkaptitecon, ie sub Frankfurt. Feliĉe, en la tendaro, kien mi venis, jam kolektiĝis tri hungaraj knaboj al mi similaj: Feri Ulrich, kalviĝanta jam en sia 18-a jaro, Dezső la cigano; kaj Ferdinand, la dandaĉo, kiu brosis ĉiutage eĉ sian veston de kaptito. Ni kvarope solidaris.*

Ankaŭ hejmen ni ekiris kune: de germana mastro ni forprenis unu el liaj ĉevalaj veturiloj; kun tiu ni venis trans la limon. Sub Budapeŝto ni vendis la veturilon al bulgara ĝardenisto, la monon dividis inter ni kaj adiaŭis. Ni promesis, ke ni ofte renkontiĝos, sed tion, se paroli sincere, mi ne tre kredis.

*Hejmenirinte, de nia domo mi ne retrovis eĉ la lokon, ĉar la Ĉefurba Ĝardenistaro jam prisemis la bombitan grundon per gazon-semoj kaj konstruis sur ĝi infanludejon. Mi primezuris: tie, kie mi dormis iam, nun staris ludil-baskulo. Pri miaj gepatroj la najbaroj diris nur tiom, ke ili mortis. Mi fortrinkis la kvaronon de la ĉevala veturilo kaj poste ankaŭ mi mem dungiĝis kiel ĉevalo: mi tiradis la ĉareton de priseka** foira vendisto; sed la prisekojn oni alŝtatigis, mi devis komenci ion alian.*

Mi venis en la Kestofabrikon „Nova Vivo", kiu estis propre prizon-surogato: la kondamnitojn, por kiuj ne estis loko en la plenplenaj malliberejoj, kaj kies puno estis tiel mallongtempa, ke oni ne devis zorgi pri ilia fuĝo, oni lokis tie por najlado de kestoj. Kaj troviĝis tie ankaŭ kelkaj nepunataj laboristoj: ciganoj, vagabondoj, ebriuloj; por ilia karakterizo mi diras nur, ke min oni nomumis ilia brigadestro. Tiuj kestoj servis nur edukajn celojn, neniu ilin bezonis, en alia loko de la fabriko alia grupo dismetis ilin kaj resendis al ni la tabulojn por rea kunnajlado; tiel per 60 kilogramoj da ligno oni povis okupi cent homojn por tuta tago.

Jam pli ol unu monaton mi laboris tie, kiam, je mia plej granda konsterno, anoncis sin tie por laboro mia iama tendara kunulo Feri Ulrich, la kalva. Li ĉarlatanis per iaj tablokovraj platoj, prenis antaŭmonojn po dek pengoj, ricevis tri monatojn pro eble tri „negocoj". Apenaŭ pasis kelkaj tagoj, kaj jen, trafis tien la cigana Dezső: li laboris ĉe la fervojo kaj lasis karamboli vin-ekspedan tenuj-vagonon kun alia vagono, por ke li povu trinki du aŭ tri ĉapojn da vino. Poste, por ke la tuta societo troviĝu kune, fine de la sekva monato alvenis ankaŭ Ferdinand la dandaĉo.

Ni kaŝis nin inter la pretaj kestoj kaj rakontis reciproke nian sorton. Familion havis nur Ferdinando, sed lin la gepatroj forpelis dehejme. Ni priparolis, ke nun ni jam restos kune post nia liberiĝo, kaj mi, liberulo, serĉu ian ĉambron aŭ subluejon, kie ni povos loĝi. Pasis la tempo, ankaŭ la cigana Dezső liberiĝis, ni serĉadis kune, sed nenie trovis lokon, kie oni akceptus nian kvaropon. Sed la fortuno nin helpis neatendite. Mortis la maljuna peltisto Ehrenthal, liajn restintajn peltoĉapojn, mufojn kaj la solan montrofenestran peltmantelon — kiun jam ne ekmordis eĉ unu tia tineo, kiu iom respektis sin mem — la parencaro disportadis, la butikon oni fermis, posteulo ne ekzistis, la magistrato tiutempe ne donis novajn permesojn de etindustrio. Nu, iun tagon mi iris tien kun Dezső kaj okupis la ejon plene malplenan. La sekvan tagon venis policano kaj notis nian nomon, sed ne elpelis nin: centoj kaj centoj akiris tiutempe loĝejon en tia maniero.

Ankaŭ Ferdinand kaj Ulrich, la kalvulo, venis tien loĝi. Ni ne havis monon por meblaro, Ferdinand do iris al sia familio kaj promesis, ke neniam plu li hejmeniros, se oni donos al li kvincent forintojn. Por ĉi tiu mono ni aĉetis en brokantfoirejo kvar latisajn litojn tiel plenajn de cimoj, ke ili mem rampis hejmen; ni pribruligis ilin per petrolo. Alian meblon ni apenaŭ havis ankaŭ poste: la person-aferistoj ne tre amis homojn de punmarkita antaŭvivo; jen unu, jen alia el ni perdis sian laborlokon, ankaŭ manĝi ni ne povis tro brile, en la manĝaĵvendejo jam antaŭe salutis nin la unuforinta ĉevalkolbaso, tiel bone ĝi nin konis.

Pri virinoj eksperimentadis nur Ferdinand: ni kvarope havis ĝuste tiom da vesto-pecoj, ke ni povis lin vesti kaj ekirigi en la espero de sukceso. Ankaŭ li ofte venis hejmen kun longa nazo. La cigana Dezső lernis kelkajn francajn vortojn kaj iris, kun sia malhela vizaĝo, al la Margareta insulo, por roli kiel araba universitatano, sed ankaŭ li ne tre prosperis. Ni elsidiĝadis sur la ŝtupo antaŭ la butiko, sed eĉ la surplacaj virinoj nin ne alrigardis, kvazaŭ ili vidus rekte en niajn poŝojn.

Iun tagon hejmenire mi rimarkis kun miro, ke iu estis balainta la trotuaron antaŭ la kontraŭflanka domo. Jam de pli ol unu jaro mi loĝis en tiu regiono, sed mi ne memoris pri tia okazaĵo. Ni pensis, ke oni ŝanĝis la pordiston, sed poste klariĝis, ke nur ŝia filino venis hejmen. La sekvan tagon ni ankaŭ ekvidis ŝin: ŝi aĝis dekses aŭ deksep jarojn, malalta, sed plen-forma; pri ŝia speco oni diras, ke ŝi havas mamojn tiel fortajn, ke oni povas sur ilin kubutumi.

Ni transsendis Ferdinandon por esplorado. Li elspionis, ke ŝia nomo estas Irena kaj ŝi lernis ĝis nun en iu provinc-urba kolegio, sed oni elĵetis ŝin ĉar ŝi enamiĝis al la centra avanulo de la urba futbal-teamo. Dum ŝi vendadis nur siajn librojn kaj vestopecojn, por ke ŝi povu iri amuziĝi kun la futbalisto, la direktoraro ne enmiksiĝis. Sed kiam ve-

---

* *Junbravuloj:* organizaĵo dum la Horthy-faŝismo; en ĝi junuloj sub soldata aĝo ricevis soldatan edukon.

** *Priseko:* privata sektoro de ekonomio.

nis la vico de la institutaj litkovrilo kaj tablokovriloj, ŝi devis fori kaj preskaŭ trafis en malliberejon.

Ankoraŭ la saman tagon, Irena venis kun ni promeni, kaj mi rimarkis, ke el ni kvar estis mi, kiu al ŝi plej plaĉis, nome ankaŭ mi mem ludis kiel centra avanulo en la fabrika futbal-teamo, sed al ni ĉiuj ŝi estis tre afabla. Ni volis venigi ŝin al ni, en la butikan ejon, sed ŝi diris, ke ŝia patro el sia lito vidas precize nian pordon, kaj ankaŭ cetere ŝi devas frue enlitiĝi hejme, ĉar nokte, kiam oni sonorigas, ŝi iras malfermi la pordon.

Tiun nokton ĉiuj kvar litlatisoj grincadis pro nia turniĝado. Mi ne scias, kion la aliaj pensadis, sed en mia kapo troviĝis Irena senĉese, kaj en mia sonĝo mi manĝadis grasan fiŝon kuiritan, kiel ĉiuokaze, kiam mi estis enamiĝinta.

Ĉiuvespere ni prenis kun ni Irenan promeni, sed eĉ unu kison ni ne povis de ŝi akiri; dum promeno mi tiel premadis ŝian manon, ke miaj fingroj ekspasmis. Mi ne kuraĝis iniciati antaŭ la ceteraj, mi decidis do, ke mi provos resti iam kun ŝi inter kvar okuloj.

Nokte mi atendis, ĝis la ceteraj endormiĝis, poste mi leviĝis, singarde entiris post mi la pordon kaj sonorigis sur la pordego de la transflanka domo. Kiel Irena estis dirinta, vere ŝi mem elvenis en nokta ĉemizo kaj negliĝo, mi kaptis ŝin je la talio, ŝin kisis kaj apogis al la muro. Ŝi ne defendis sin. Ŝi flustris, ke ŝi min ekamis en la momento, kiam ŝi min ekvidis, kaj miajn tri kunulojn ŝi toleris nur por tio, ke ŝi povu min renkontadi. Kiam ni adiaŭis, ŝi petis de mi du forintojn, ĉar al sia patro, kompreneble, ŝi devis diri, ke por iu loĝanto ŝi malfermis la pordegon, kaj tial ŝi devis doni kalkulon pri la pordega mono.

Mi estus dezirinta de tiam promeni gesole kun Irena, mi provis deskui la ceterajn, sed kion ajn mi diris, ili ne volis cedi. Fine mi elmontris la grandan atuton, ke Irena amas sole min. Ili postulis, ke mi tion pruvu, kaj mi — honte aŭ nehonte — rakontis al ili, kio okazis ĉe pordeg-malfermo. Je tio ankaŭ ili saltleviĝis de sur sia lito kaj, superkriante sin reciproke, ili pruvadis, ke en po unu nokto jam ankaŭ ili tiel same sonorigis ĉe la transflanka pordego, kaj ke Irena ankaŭ al ili rifuzis nenion, eĉ la du forintojn ŝi forpetis ĉiam, ke ŝi povu sin pravigi ĉe sia patro.

Kial nei, en la unua momento haltis mia spiro pro la amareco, ke Irena al mi mensogis, sed poste mi konsolis min per tio, ke pli bone ja tiel, ĉar la respondeco estas malpli granda, nur la kvarona. Ni interkonsentis, ke ni agos, kvazaŭ ni ne scius unu pri la alia, kaj ni fiksis por ni eĉ la vic-ordon de la sonorigo.

Ankaŭ plue ni promenis vespere kun Irena. Malofte ŝi ankaŭ venis al ni, purigis, metis ordon, tiel lerte ŝi igis hejmeca tiun aĉan peltist-metiejon, ke estis ĝoje iri hejmen; nun mi komencis vere bedaŭri, ke ŝi cedis ankaŭ al la aliaj, ne restis mia ekskluzive. Ŝi ekonomie distribuis nian monon, tiel ke ni povis aĉeti ankaŭ vestojn, aranĝadis niajn aferojn; se iu el ni estis afliktita, ŝi lin konsolis.

Iun vesperon ni ĝuste volis iri ŝin voki, kiam Ferdinand mansignis, ke ni restu, ĉar li volas al ni komuniki ion gravan. Li diris, ke Irena estas graveda, hieraŭ ŝi estis ĉe kuracisto, sed jam estas malfrue interveni, la infano naskiĝos; li demandis, kion do ni faru. Ni ĉiuj sciis, ke se la afero malkaŝiĝos, Irenan mortbatos ŝia patro. La cigana Dezső proponis, ke ni rifuĝu el la regiono, sed ni preskaŭ tradraŝis lin, tiel malnobla afero ni sentis translasi ŝin al ŝia sorto. Ĉar ni ĉiuj kun egala ŝanco povis nin rigardi patro de la naskota infano, kvar slipojn kun niaj nomoj ni ĵetis en ĉapelon kaj eltiris unu. Kial longe ĉirkaŭfrazi: sur la slipo estis mia nomo.

Kunpremiĝis mia koro, kaj mi provis trovi ian elturniĝon, sed helpis nek fabelo nek ribelo, mi konsentis ja la lotadon, kaj neniu trompis. La aliaj min konsolis per tio, ke mi ne bezonas travivi kun Irena mian tutan vivon, jam la tagon post la geedziĝo mi povas komenci la eksedziĝ-proceson, kaj al la infan-alimentoj ankaŭ ili kontribuos, pri tio ili emas doni eĉ skribaĵon. Ili min kaptis, kondukis al la dompordisto, igis min svatiĝi pri lia filino. Post la gefianĉiĝo ili malaperis el la regiono.

Mi ne scias, ĉu iu jam ploris en sia nuptonokto. Mi konfesas, ke mi ploris. Mi pensis, ke mi havos edzinon, al kies dorso oni povas surkudri la pajlosakon. Post la geedziĝo la bogepatroj iris loĝi en sian provincan dometon, kaj anstataŭ ili ni fariĝis la gepordistoj. Mi devas sincere diri, ke tre agrable mi trompiĝis pri Irena. Ŝi serĉis por si okupon, fariĝis vendistino en magazeno, tamen ŝi tenis hejme tian ordon, ke oni povus manĝi de sur la planko.

Origine mi pensis, ke mi ĝisatendos la naskiĝon de la infano kaj poste mi foriros, sed ĉiam mi prokrastis la foriron per unu monato, kaj fine mi jam ne donis al mi novajn limtempojn; mi deziras al ĉiu, ke li vivu en tiel bona edzeco kiel mi kun Irena.

Pasis ĉirkaŭ tri jaroj, post kiam iun nokton oni longe sonorigis ĉe la pordego. Irena ellitiĝis kaj eliris, sed baldaŭ revenis senspire kuregante: la cigana Dezső staris antaŭ la pordego, kaj kiam ŝi ĝin malfermis, li volis ŝin brakumi, apenaŭ ŝi povis liberiĝi el liaj manoj. Ĝis mi elvenis, Dezső jam forkuris, sed mi decidis, ke de nun mi mem pordumos nokte.

Kaj venis vice Ferdinand, Ulrich kaj la cigana Dezső, ĉiu en vestoj eluzitaj kaj tiel malgrase, ke oni povus enkudriligi la pinton de ilia nazo. Ĉiu deziris havi Irenan, ili petis, petegis, ke mi eksedziĝu, ili ŝin edzinigos, ĉar neniam ili estis tiel feliĉaj kaj fortunaj, kiel kiam Irena pri ili gardis.

Kompreneble mi ne translasis mian edzinon. Tiam ili ĵetis sin sur min, kaj ni, amikoj iamaj, interbatis en la pordego je vivo kaj morto; ili foriris kun sanga kapo. Ne ŝajnis probabla, ke ili ankoraŭ revenos, kaj mi ankaŭ fidis je Irena, tamen ankoraŭ dum jaroj mi tenis malnovan soldatan ferboksilon apud mia lito, kaj, se oni sonorigis, kun tiu mi eliris malfermi la pordegon.

Tr. K. Kalocsay



Zoltán Kodály

Ĉi-somere jam la kvinan fojon estis aranĝita en Hungario la internacia ĥorfestivalo Bartók Béla. En la konkurso partoprenis ok eksterlandaj kaj dekses hungaraj ĥoroj. Pro la altnivela arta prezentado de la modernaj samtempulaj verkoj la Madrigal-ĥoro el Brno (Ĉeĥoslovakio), la Ensemble Cantamus el Mansfield (Anglio), la finna kameroĥoro Klemetti-Opisto kaj la Kodály-ĥoro el Debrecen ricevis la diplomon de la V-a internacia ĥorfestivalo Bartók Béla. La ĥoro de la teknologia alternejo de Leningrad ricevis apartan premion pro sia altnivela plenumaĵo.

La Kleriga Ministerio, la urbo Kecskemét kaj UNESCO en aŭgusto jam la duan fojon aranĝis en naskiĝurbo de la eminenta komponisto, en Kecskemét la seminarion Kodály. Ĝin partoprenis 28 hungaraj kaj 112 eksterlandaj membroj, inter ili japanaj, sovetaj, belgaj, aŭstraj, norvegaj, kanadaj, svisaj, egiptaj, usonaj muzikistoj kaj pedagogoj. La celo de la preskaŭ unumonata seminario estis la konigo de la hungara kantinstruado kaj de la metodo Kodály, krome la muzika kaj pedagogia plueduko de la membroj. Ĉi-jare ricevis pli vastan terenon (ol pli frue) la komponista vivoverko de Kodály. La ĥorokupiĝoj estis organizitaj tiel, ke la aŭskultantoj povis konatiĝi du semajnojn kun kantoj de Bartók, du semajnojn kun kantoj de Kodály. Ankaŭ en la analizoj de la komponaĵoj servis kiel modeloj unuavice kreaĵoj de Kodály. La programon de la seminario Kodály kompletigis dek koncertoj.

Laŭ mendo de kvin libroeldonejoj la Presejo Kner en Gyoma pretigas bibliofilajn librojn en formato de 10 x 17 cm. En tiu ĉi jaro aperos tiaj libroj el la verkoj de Goethe, Burns, Jesenin, Ferenc Juhász, Janus Pannonius kaj aliaj poetoj.

Esplorinte por novaj oleo-teritorioj en la pasinta jardeko en Hungario oni boris pli ol 450 putojn, el kiuj almenaŭ 35-grada varmakvo ŝprucis surfacen. Por eluzi tiun ĉi unikan eblon en Eŭropo, laŭ komisio de la Tutlanda Akvoafera Oficejo estas ellaborita en nia patrio ampleksa banejevoluiga plano.

Bonan novjaron!

Ekslibriso de Éva Hajós

Al ĉiuj niaj legantoj kaj esperantistoj ni deziras sincere agrablan kristnaskon kaj bonan novjaron! Bonan sanon kaj multajn sukcesojn!

Hungara Vivo

Tibor Szántó libroartisto

La Internacia Federacio de la Bibliotekistaj Asocioj (IFLA) kaj la Internacia Dokumentada Federacio (FID) ĉi-jare aranĝis sian ĝeneralan kunsidon en Budapest kun partopreno de 800 eksterlandaj gastoj. Ambaŭ aranĝaĵoj kroĉiĝis al la librojaro de UNESCO. Pasintjare eldonis ja UNESCO la „Ĉarton de l' libro", la bazan dokumenton, kiu deklaras la rajton al la legado, urĝas la likvidon de la analfabetismo kaj la kontentigon de la ŝanĝiĝantaj pretendoj de la legantoj. La centra temo de la konferenco de IFLA estis: legado en la ŝanĝiĝanta mondo. — Okcidentaj kultursociologoj ofte ja emfazas, ke en niaj tagoj la libro, la legado estas en krizo, kaj ĝian rolon transprenas la amas-informadiloj. Tamen la indikoj de la socialismaj landoj atestas pri alio. Ekzemple en Hungario la nombro de la eldonitaj libroj de post 1938 pliiĝis je tri- kaj duonoblo, ilia eldonnombro je kvinoblo.

En la kongreso de FID oni traktadis pri scienc- kaj informadpolitikaj problemoj. La prelegoj parolis pri la du plej grandaj malfaciloj de la informado: la unua estas, kion oni kutimas nomi informad-eksplodo, la dua estas la pligrandiĝo de la pretendo por la informado. En la lastaj tempoj ĉiam pli ofte metiĝas la demando en internaciaj forumoj, ke en la scienca informado necesus sistemo kuntenanta la mondon.



panoramo

En la franca grandurbo *Bordeaux* estis aranĝita ekspozicio sub titolo *„Trezoroj de la Budapeŝta muzeo"*. La ekspozicio laŭ la franca preso estis elstara kultura evento de 1972. Ĉe la malfermo de la ekspozicio la hungara kultura ministro *Pál Ilku* salutis la publikon de la urbo Bordeaux kaj ankaŭ la ĉeestantan ĉefministron *Chaban-Delmas*, kiu samtempe estas la urbestro de la gastiganta urbo kaj estis patrono de la ekspozicio. En la ekspozicio, kiu estis malfermita dum pluraj monatoj, on prezentis la trezorojn de la Belarta Muzeo de Budapeŝto, unuavice la artaĵojn de la hispanaj majstroj: de Greco, Velazquez, Murillo, Zurbaran kaj Goya, la verajn perlojn de nia mondfama hispana kolektaĵo. Krome Italio, Nederlando, Anglio kaj kompreneble la gastiganta Francio rolis per la plej gravaj artaĵoj en la kolektivo elprenita el la hungara kolektaĵo, montranta ĝis la XXa jc. la evoluon, sanĝiĝon de la stiloj. El la desegnaĵ-kolekto — kiu akompanis la pentraĵojn — ne forestis ankaŭ la ravaj skizoj-verkoj de Pieter Brueghel kaj Rembrandt.

El Greco: Malliberigo de Kristo

Laŭ la statistikaj indikoj de la unua duonjaro ekde la 1-a de januaro ĝis la 30a de julio 1,7 milionoj da eksterlandanoj transpaŝis niajn limojn, per 3,6 procentoj pli, ol en la unua duono de la pasinta jaro. La nombro de la eksterlandanoj alveninta̍j el la socialismaj landoj proksimume estas senŝanĝa, male, el la kapitalismaj landoj alvenis per 23 procentoj pli, ol pasintjare. Pleje kreskis por niaj ripozlokoj la interesiĝo de la turistoj el GDF: ili vizitis Hungarion per 36 procentoj pli ol pasintjare. La nombro de la anglaj gastoj per 22, tiu de la aŭstroj per 18 procentoj estis pli alta ol la pasintjara. Simile al la pasintaj jaroj, la ĉefan fremdultrafikan altirforton reprezentas Balaton kaj Budapest: ĉi tiuj du region-unuoj estis la vojaĝcelo de 70 procentoj de la turistoj.

Laŭ la statistiko en la unua duono de 1972 la nombro de la hungaroj vizitantaj eksterlandon estis pli alta per 17 procentoj. En tiu ĉi jaro 391 mil hungaraj turistoj pasigis eksterlande certan tempon.

En la proksima futuro, en Hindujo aperos hungara antologio de noveloj, en la lingvo „hindi". Oni eldonos hungarajn rakontojn en la lingvoj novhinda, tamila, malajalama, poemojn en la lingvoj hindia kaj paŋĝaba. La konigon de la hungara literaturo akcelas, ke en la universitato de Delhi jam de du jaroj sukcese daŭras la instruado de la hungara lingvo kaj literaturo.

Ĉi-somere muzikpedagogoj, prezentartistoj de deksep landoj — Bulgario, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Usono, Greklando, Nederlando, Irano, Irlando, Jugoslavio, Pollando, Hungario, Mongolio, Germana Federacia Respubliko, Rumanio, Svedlando kaj Sovetunio — en Budapeŝto aranĝis la VI-an Bartók-seminarion.

En la dua duono de la jaro la Instituto de Kulturaj Interrilatoj organizis ĉirkaŭ cent hungarajn belartajn ekspoziciojn. Ekzemple en Helsinki estis aranĝita ekspozicio, kiu ilustras la vivon kaj agadon de Zoltán Kodály. Sep hungaraj artistoj partoprenis en la internacia ceramika ekspozicio en Faenza. En Firenze la publiko povis spektadi la ekspozicion „Cent jaroj de la hungara artobjektoŝirmado". Ni partoprenis en la hinduja kaj japana internaciaj ekspozicioj de infandesegnaĵoj. Hungaraj grafikistoj la unuan fojon montris siajn artaĵojn en la internacia karikatura ekspozicio en Montreal. En Belgio estis aranĝita ekspozicio pri historio de Budapest. Nia patrio reprezentigis sin en la Unuiĝinta Araba Respubliko en etnografia, en Etiopio en etplastika, en la ĉefurbo de Peruo en fremdultrafika, en Kuvaito en etnografia, en Okcident-Berlino en grafika kaj en Hispanio en teksarta ekspozicioj.

Dum la dek jaroj de la hungarahinda kultura kontrakto tre multe evoluis niaj sciencaj kaj kulturaj interrilatoj. Hungaraj sciencistoj estis en Hindujo, hindaj sciencistoj vizitis nian patrion. Preskaŭ cent sciencaj institucioj staras en interŝanĝ-rilato unu kun la alia. Artaj ekspozicioj, gast-roladoj okazas ofte en la du landoj.

Ankaŭ la infanoj estas bonrezultaj diplomatoj de niaj kulturaj interrilatoj. En la internaciaj infan-artaj konkursoj de Shankar jam de jaroj partoprenas hungaraj geknaboj, kaj ilia nomo regule legeblas inter la ormedaluloj de la respublika prezidento. La UNESCO-komitatoj de la du landoj aranĝas konkurojn por mezlernejanoj.

Laŭ deziro de la internacia fakfederacio, fine de aŭgusto kaj komence de septembro Hungario aranĝis en Budapeŝto la I-an Mondkonkurson de Vino. En la aranĝaĵo partoprenis 700 hungaraj kaj 1200 eksterlandaj fakuloj. 33 landoj entute kun 1350 vinospecoj rolis en la konkurso.

En la mondo nuntempe oni kulturas vinberujon sur teritorio de dek milionoj da hektaroj, kaj la jara vinproduktado atingas 300 milionojn da hektolitroj. En la vinproduktado de la mondo Hungario staras sur la 11—12a loko, kaj en la vinkonsumado po persono ĝi staras proksimume sur la 10a loko.

Ĉu vi ŝatas HUNGARAn VIVOn? Rekomendu ĝin ankaŭ al viaj amikoj!



Karlo Nagy

Aluminio, la hungara arĝento

Ĉu estas eble, ke en Hungario la aluminio estas arĝento? Estas ne tro kredeble. Sed ĉiu homo, ĉiu popolo fieras pri tio, kion ĝi havas. Neniu, havante iom da geografiaj sciencoj, ne ekkuraĝos kompari ian lagon al la grandeco de maro, tamen en Hungario nia belega Balatono estas nomata „hungara maro". Eĉ iu popolkanto ŝerce esprimas la situon de la treege malriĉa homo: „Malhavanto de l' hundo / Mem vespere bojas. / Ne havante azenon / Li piede vojas..." Eble tiel estas kompreneble, ke en Hungario — havanta tre malmulte da valoraj (eĉ bedaŭrinde preskaŭ de ĉiuj) metaloj — oni rigardas la aluminion io valora, pri kio nia lando estas riĉa.

Vere, nuntempe Hungario havas konsiderindan alumini-produktadon kaj konsumadon, baziĝantan sur la signifa kvanto de krudaĵo de aluminio: baŭksito. La tutmondaj baŭksitesploroj geologiaj, komenciĝintaj post la 1920-a jaro, demonstris sufiĉe grandan trezoron de tiu ĉi valora mineralo ankaŭ en Hungario. Sed tiun ĉi trezoron dum la periodo inter la du mondmilitoj oni ne tre efike eluzis, kaj eĉ tiu kvanto, kiun oni prilaboris, servis fremdajn interesojn. Tamen la preparoj al la dua mondmilito fundamentis la hungaran prilabor-industrion de aluminio — tiam ankoraŭ en tre modesta mezuro. Post la dua mondmilito laŭ la konvencio en Potsdamo la germanaj entreprenoj de aluminiindustrio en Hungario alvenis en la proprajon de Sovetunio, kiu tuj komencis la funkciigadon de tiuj industriaj objektoj, fondiginte komunan hungaran-sovetan kompanion por la aluminiindustrio. Flanke de la Sovetunio en la 1954-a jaro kun favoraj kondiĉoj estis transdonitaj la aluminiuzinoj al la hungara ŝtato. Dum tiu ĉi periodo kaj dum tiu sekvanta ĝis la 1962-a jaro, la produktado de baŭksito, alumino kaj mem la aluminio kontinue kreskis.

Sed la nombroj ne tute respegulas tiun kvalitan — sciencan kaj teknikan — antaŭpaŝon, kiu okazis dum la lastaj jaroj de la 50-a jardeko. Tamen la zorgo pri la pluaj rezultatoj de la aluminiproduktado devigis la estraron de industribranĉo serĉi la solvon de la problema kontraŭdiro inter la abundo de baŭksitaj mineraltrezoroj kaj la malsufiĉo de elektra energio.

Estas larĝekonata fakto, ke la alumino bezonas multege da elektroenergio por fariĝi aluminio en la elektroliza procezo. La stato de malriĉeco pri elektroenergio en nia lando kaj ĝia alta kosto malebligas ekonomie produkti la aluminion, pro kio difinita parto de la kapacito de aluminiaj fornegoj ne estis eluzata. Tiam ekzistis du vojoj de evoluigo de aluminiindustrio en Hungario:

1. Rezigni pri la evoluigo, proporcia al krudaĵbazo, de tre profitaj finfaraj laboretapoj de la baŭksitprilaboro: pri la produktado de duonproduktaĵoj kaj pretaj fabrikaĵoj aluminiaj, aŭ:

2. Solvi la problemon de aluminielektroliza produktado — kiu povas esti plilarĝigota nur en malgranda mezuro en nia lando — eluzante la internacian kooperadon.

Estis elektita la dua vojo: inter la landoj de la *Konsilantaro de Reciproka Ekonomia Helpo* estas faritaj ŝtataj konvencioj, nome kun Ĉeĥoslovakio (en la jaro 1951), kun Pollando (1960) kaj kun la Sovetunio (1962), laŭ kiuj por la el Hungario liverata alumino la menciitaj landoj redonas la konvenan kvanton de aluminio, alidire tio ĉi estas la importo de elektroenergio implicita en la metalon. Estas evidente, ke Hungario, kaj ĝenerale ĉiuj landoj, disponantaj pri iom konsiderinda baŭksitkvanto, havas

intereson trovi la premisojn por la vertikala formigo de sia aluminiindustrio, kaj la en erco minitan metalkvanton vendi en formo, kiel eble plej alta laŭ la prilabora grado kaj en plej ĝusta ekonomia proporcio.

Tiu helpo malfermis la vojon al la multflanka kaj dinamika disvolviĝo de la produktado ne nur de duonfabrikaĵoj, sed ankaŭ de pretaj produktaĵoj. La jaro 1970-a en tiu ĉi rilato estis rekorda, ĉar la aluminikonsumo, rilate al unu ŝtatano, atingis la 10 kilopondon, kaj tiu ĉi nombro en 1971-a jaro pligrandiĝis al 10,3 kp/kapo.

Kio ja servas la bazon de tiu ĉi konsiderinda evoluo?

Unue: en Hungario estas troveblaj ĉiuj eblaĵoj por la tuta teknologio de aluminiproduktado (krom la menciita malsufiĉo de elektroenergio).

Due: la aluminio estas tre interesa kaj valora metalo por industrio. Ĝi unuigas en si tutan vicon de favoraj proprecoj: malkorodeco, facileco (la specifa pezo estas ĉirkaŭ 2,7 p/cm^3), plastika formebleco, veldebleco, tornebleco (frezebleco), polurebleco, anoda oksidebleco, bona elektro- kaj varmokondukemo, muldebleco. La aluminio havas tre variajn mekanikajn proprecojn depende de la alojspeco, la kondiĉoj de la termika prilaboro, ktp.

La tuta aluminiindustrio en sia vertikaleco estas en la centro de l' atento de la ekonomia vivo de Hungario. La *Tutlanda Komisiono por la Teknika Evoluo*, konsiderinte la starpunktojn kaj la evoluigajn planojn de la *Trusto de Hungara Aluminiindustrio* kaj de la plej signifaj entreprenoj, konsumantaj aluminion, ellaboris la *Centran Programon de la Evoluigo de l' Aluminiindustrio*, kiun la *Aluminiindustria Registara Komisiono* akceptis. La koordigadon de la diversdirekta evoluiga laboro, la esploradon de novaj kampoj por la aluminiutiligo kaj la adaptadon de novaj rezultatoj en la industrio ege akcelis la agado de la *Aplikteknika Centro de la Aluminio.*

En Hungario troviĝas ĉiuj — objektaj kaj subjektaj — kondiĉoj por realigo de la estonta pligrandiĝo la „hungara arĝento" pli vere kaj utile plenumu sian rolon.

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵpavilono
EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono
EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo
EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

UTASELLATÓ

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno, Budapest V., Veres Pálné u. 24 Tel.: 189-900/160

ĈAPITROJ EL LA HUNGARA MUZIKHISTORIO

Hungara muziko en la 18-a jarcento

La hungara historio de la 18-a jarcento, precipe en ĝiaj unuaj jardekoj povas esti karakterizita per la liberigaj movadoj kaj militoj. Ĉi tiu movriĉa periodo finiĝis apenaŭ post la unua jardeko de la 18-a jarcento. En tiu tempo la tuta hungara socio transvivis ekscitan vivon. La progresaj fortoj de la lando iniciis grandmezuran nacian movadon, celantan ne nur la liberigon de la lando de l' fremda jugo, sed samtempe la plibonigon de la sortoj de l' kamparanoj, de la plimulto de la laborantaj homoj kaj de la naciaj minoritatoj.

Mondfama melodio signas ĉi tiun historian epokon: la Rákóczi-marŝo, kiun ĉiu muzikamanto konas laŭ la prilaboroj de Ferenc Erkel (1840), Hector Berlioz (1846) kaj Ferenc Liszt (1852, 1865). Aliaj kantoj el ĉi tiu tempo estas konataj en niaj tagoj sub la nomo de *kantoj de kurucoj.* (Kurucoj oni nomas la hungarajn batalantojn por libero kaj sendependo de Hungario en la unuaj jardekoj de la 18-a jarcento.)

La gardantoj de la patriotaj sentoj kaj agemo estis en la 18-a jarcento en Hungario la junularo, precipe la studentoj, kiuj devenis plejparte el la eta nobelularo. Ĉi tiuj progresemaj junuloj vivis tiatempe en la loĝdomoj de la altlernejoj, en la t.n. *kolegioj,* troviĝantaj i.a. en la hungaraj urboj Debrecen, Sárospatak, Pápa, eĉ en Transsilvanio ktp. Baldaŭ kreiĝis aparta muzikkulturo, la t.n. „kolegia muzika kulturo".

La *kolegia muzika kulturo* alportis multajn „modernajn" elementojn en la hungaran muzikon. Al la ĝistiamaj gamoj, la pentatonio kaj la modalaj gamoj, nun jam la mezeŭropa duramola gamsistemo viciĝas, ricevas egalrajton kaj post nelonge akiras ĉefrolon en la kantoj, apartenantaj al ĉi tiu muzika stilo. Samtempe en la strukturo de la hungaraj kantoj fariĝas ĉiam pli kaj pli ofta la ‚arko", kies plej karaktera eco estas la *reprizo,* kion oni do povas prave nomi „pontostrukturo". Eĉ en la popolaj kantoj, naskiĝintaj ekde tiu tempo, ĉi tiu strukturo estas tipa ĝis nia tempo.

El la ĝis nun menciitaj faktoj sekvas, ke la plej diversaj influoj kaj stilaj tendencoj atingis nun la hungaran muzikkulturon — la influo de la okcidenta muziko, antaŭ ĉio la delikata kaj gracia sentimentalismo: la muziko de la rokoko-periodo. Ĉi tiu nova stilo post nelonge ekregis en la plejmulto de la hungaraj kantoj, fariĝis moda kaj ĝenerale konata.

Memkompreneble, ke moda stilo ne povas dum longa tempo resti en mallarĝaj kadroj; la novaj melodioj baldaŭ eksoniĝis ne nur en la rondoj de la kolegiaj studentoj, sed ankaŭ en la vasta amaso de la popolo.

La nova hungara muziko trovis la vojon al la scenejo. Kune kun la plej unuaj primitivaj formoj de la teatraĵoj aperis en ĝi la kantoj de la nova hungara muzika stilo. Ne nur la melodioj de la najbaraj popoloj penetris en la hungara muzikkulturo: krom la aŭstraj kantoj la popolo baldaŭ havis la eblon ekkoni la italajn kaj francajn rokokokantojn; la germana menueto kaj valso, la itala gajlardo, la francaj kantoj — ili ĉiuj fariĝis je fino de la 18-a jarcento gravaj partoj de la hungara muzika stilo.

Ĉi tiu multkolora, multflanka muzikkulturo gvidis konsekvence al nova, ĝenerala kaj unueca hungara muzikstilo — al la *stilo de la verbunko.*

D-ro Lajos LESZNAI

Eksterlandaj sukcesoj de hungaraj muzikistoj

Hungario estas proporcie malgranda lando. Ĝi estas tamen en favora situacio, se oni devas raporti pri eksterlandaj sukcesoj de ĝia muzikkulturo. Ĉiujare oni povas mencii vicon de nomoj de muzikistoj, kiuj gajnis premiojn dum internaciaj muzikaj konkursoj.

En ĉi tiu jaro tia listo estas eĉ pli ampleksa, ol antaŭe. Mi nun pensas interesa mencii sole la nomojn de la plej elstaraj gajnintoj.

En Barcelona, dum la „Canals" fortepiano-konkurso la hungara *Klára Baranyi* gajnis la I-an premion. En Versailles eĉ du hungaraj junaj muzikistoj atingis premiojn dum la fortepiano-konkurso „Cziffra": la II-an premion ricevis *Jenő Jandó,* la III-an kune kun alia pianisto *Norbert Szelecsényi.* En Vieno en ĉi tiu jaro estis aranĝata la I-a Internacia Muzika Konkurso de la „Gesellschaft der Musikfreunde" (mondfama, antaŭ 160 jaroj fondita societo por protektado de la altnivela muzikkulturo) kaj dum ĝi la hungara *István Gáti* ricevis la II-an premion en la kategorio kanto. En Leipzig dum la Bach-konkurso la II-an premion ricevis en la fako orgeno *István Ella* kaj la III-an *Julia Pászthy* en la kategorio kanto. En Londono dum la Konkurso „Flesch" *Csaba Erdélyi* ricevis la I-a premion en la kategorio aldviolono.

Nun mi menciis nur la *solistojn* kaj sole la gajnintojn de la plej altaj premioj, ĉar estus eble daŭrigi la nomliston per multaj aliaj nomoj.

Ĉi tiu listo signas ne nur la grandan talenton de la junaj hungaraj muzikistoj, sed ankaŭ la altan nivelon de la hungara muzikpedagogio kaj sukcesplenan, ofereman agadon de la hungaraj muzikpedagogoj.

L. L.

ESPLORADO KAJ PRODUKTADO DE IZOTOPOJ

En la Izotopinstituto de la Hungara Scienca Akademio direktoro d-ro Gábor Földiák, doktoro de la kemiaj sciencoj kaj vicdirektoro d-ro Árpád Veres, doktoro de la fizikaj sciencoj, kune kun la gvidaj kunlaborantoj de la instituto informis la ĵurnalistojn pri tio, kiel evoluis en la lastaj jaroj la instituto, funkcianta jam de 12 jaroj, kaj kio estas ĝiaj pluaj planoj.

Pri la Hungarlanda aplikado de la izotopoj ili donis la informon, ke en industria aplikado ni superis la Eŭropan mezvaloron; sole la t.n. radiografia esplormetodo ne povis ankoraŭ vaste enradikiĝi, malgraŭ ke tiu moderna metodo grave helpus kaj igus profitdona kaj pli rapida la kontroladon de la veldaĵoj, veldcikatroj kaj fandaĵoj.

Tre vastaj estas la medicina kaj scienca aplikadoj de la izotopoj. En 90 hospitaloj kaj klinikoj oni uzas 30 specojn de izotopoj, parte ĉe esploroj, parte cele de kuracado. Plurajn perizotopajn procedojn oni uzas jam rutine ankaŭ en la agrikulturo.

EKKONU NIAJN PRODUKTOJN

— ULTRAKURT–ONDAJ RADIOTELEFONOJ

— MAGNETOFONOJ

— AŬTOMATAJ RAPORTREGISTRILOJ

— KOMPUTER–PERIFERIAJ BLOKOJ



BUDAPESTI RÁDIOTECHNIKAI GYÁR
BUDAPEŜTA RADIOTEKNIKA FABRIKO

BUDAPEŜTO, III., POLGÁR U. 8—10.
Telefono: 686-080 Telex: 22-5928

Milito de kamparanoj

György Dózsa naskiĝis antaŭ 500 jaroj

Ne nur pugnoj kunpremiĝis en la feŭdisma Hungarujo kontraŭ la mizera servutula stato. Plurfoje okazis, ke el laboriloj fariĝis armiloj, ke kasteloj cindriĝis: oni provis ĉesigi la pezan premon de la nobela bienularo. Plej grava kaj signifa tia provo estis la milito de kamparanoj en 1514, estrata de György Dózsa (pr.: Djördj Doĵa), kies jubileon oni solenas ĉi-jare.

Li naskiĝis en Transilvanio (nun parto de Rumanujo) en simpla familio, kaj famiĝis kiel brava soldato, jam plurfoje distingita kapitano de la reĝo en la bataloj ĉe la landlimo, kontraŭ la daŭre atakantaj turkaj trupoj. En 1514 la kapitano ricevis gravegan taskon: li estu ĉefkomandanto de la freŝe proklamita kruc-milito kontraŭ la turkoj!

La osman-turka imperio tiutempe jam forte minacis la evoluon kaj sendependecon de Hungarujo, kaj tion jam bone sentis la kamparanoj. Multaj el ili pretis defendi sian familion, la landon, kie troviĝis ilia kabano kaj terpeco, hejmo, kaj viveblajo. Ili pretis, kvankam la landon prezentis por ili preskaŭ nur pezan ekspluatadon kaj senrajtecon. Kamparanoj hungaraj kaj alinaciaj: slovakoj, rumanoj, serboj k.a., vivantaj en la lando, grandnombre kolektigis ĉe Peŝto por militiri kontraŭ la turka okupanto. La reganta klaso teruriĝis pro ilia nombro kaj kontraŭfeŭdisma sinteno: tiel ke ili multe pli timis la armitan popolon ol la turkan invadon, kaj decidis disigi la kruc-armeon. Tiam plene malfermiĝis la okuloj de la kamparanoj: la malamiko estas interne, en la lando. Venki la nobelojn-bienulojn, liberiĝi de la premega servuteco, nun fariĝis la celo de la kampula armeo.

Ĝi ne obeis la disigan ordonon de la reĝo, ĝi havis ja kapablajn gvidantojn, spertajn oficirojn, ĉe-kape la faman Dózsa, pastrojn, diakonojn, kiuj povis doni ideojn, difini celojn, konsciigi kaj stimuli la amasojn. Ververe, temis pri kontraŭfeŭdisma movado, kiun provokis la pli kaj pli sufoka subpremo de la reganta klaso. Tiutempe, en la komenco de la 16-a jarcento, senteble pligrandiĝis la merkato de la varoj, sekve la bienuloj-nobeloj jam ne kontentis per la naturaj servut-liveraĵoj: ili volis eltordi el la servutuloj monon por aĉeti varojn. Tiel estis tiutempe en tuta Eŭropo, tial ekflagris tiutempe popol-insurekcioj en granda parto de Eŭropo. En Hungarujo la koleron de la popolo eĉ plifortigis, ke la nobelaro videble volis malhelpi tion, kio estus ĝia historia tasko: defendi la landon kontraŭ malamiko.

Dózsa gvidis la popolarmeon en pluraj militiroj tra la lando, kun multaj venkoj. Decidiĝinta revoluciulo kaj bona organizanto li pruviĝis kontraŭ la bone ekipitaj kaj ekzercitaj nobelotrupoj. Finfine, tamen, la unuiĝintaj nobel-armeoj venkis la kamparanan armeon apud Temesvár (nun Timişoara en Rumanujo). Sekvis furioza kaj kruelega venĝo: la popolgvidantoj estis ekzekutitaj post sovaĝaj torturoj, Dózsa mem estis sidigita sur ardan ferseĝon kaj kronita per ardanta krono. Lian heroan kaj suferelportan konduton mire registris eĉ la pornobelaj kronikistoj. Sed tiu venĝo, kiu puŝis la tutan servutularon en nigran mizeron kaj plenan senrajtecon „por eterne", havis gravajn sekvojn ankaŭ por la lando: tiom ĝin malfortigis, ke post kelkaj jaroj, en 1526, Hungarujo falis sub la turkan okupon.

Ervin FENYVESI

József Somogyi

Jene komenciĝas artikolo pri li en la belarta leksikono aperinta en 1968: „Li naskiĝis en 1916, skulptisto, honorigita per Munkácsy-kaj Kossuth-premio. Merita artisto, profesoro de Belarta Altlernejo, prezidanto de Asocio de Hungaraj Belartistoj. Unu el la plej talentaj skulptistoj, agantaj post la dua mondmilito . . ."

Jam nun ni povas certe diri: li estas plej talenta el niaj nunaj skulptistoj. Kial li meritis ĉi tiun pozicion en nia artvivo? Ne sole per simpatia modesteco, nek per ofta rolo en nia arta kaj socia vivo. Ĉi tiun eminentan rangon li akiris per siaj kreaĵoj, el kiuj radias homa grandeco, forto, pureco. Ĉi tiuj skulptaĵoj estas tradiciaj kaj modernaj, ilin karakterizas monumentaleco, sed ankaŭ la 20—30 centimetraj skulptaĵoj aspektas monumentaj, ŝajne tial, ĉar li formas siajn samtempulojn kaj por li ne ekzistas en la mondo pli majesta kaj potenca ol la homo.

Ekde la komenco de lia vojo precipe lin ekscitas la figuro de la aktiva, revoluciema homo. Nun ni povas mencii nur unu kreaĵon: skulpton pri Dózsa, kreitan unuafoje en 1958, kaj ĉijare en junio oni inaŭguris duan variaĵon de la statuo. Kiamaniere eblas esprimi la forton kaj decidon de kamparangvidanto kaj batalanta kampararo, tion fidele spegulas la tutstatua bildo sur nia titolpaĝo. Kaj kiaj fortoj, emocioj, konjektoj povis furiozi en tiu popolgvidanto, pri tio konfesas sugestive la bildo pri kapo de skulpto videbla sur ĉi tiu paĝo.

La verkaro de Somogyi estas jam ĝis nun impone riĉa. Post la elstaraj kreaĵoj: Metalurgisto, Tombmonumento de pentristo László Mednyánszky, János Szántó-Kovács (kamparargvidanto en komenco de nia jarcento), Miklós Zrínyi (fortikaĵ-kapitano en 1552), Patrino kun sia infano, Virino kun violonĉelo, Lukto — digna stacio estas la dua Dózsa-skulptaĵo. Ĉi tiuj kreaĵoj estas tiaj, ke ili meritas lokon inter la plej atentindaj skulptaĵoj de nia epoko.

Mihály GERGELY

POST MUNKENO

Oni solene malhisis la imponan standardon de la 20aj Olimpiaj Ludoj. La amatoraj sportistoj de cent dudek kvar landoj ekvojaĝis hejmen, kunportante la rememoron pri travivaĵoj neforgeseblaj, la kortuŝan sentimenton de la — eble nenie alie spertebla — vera amikeco inter la nacioj de la mondo, kaj hejmenportis pli- malpli grandan kvanton da oraj, arĝentaj kaj bronzaj medaloj, la modestajn trofeojn de noblaj sportaj bataloj en la plej diversaj konkursoj de la 23 sportobranĉoj konsistigintaj la Munkenan olimpikon.

Kiel kutime, la grandnombra grupo de la hungaraj olimpikuloj ankaŭ ĉi-okaze plenumis sian devon, kaj kun la rezulto de 6 oraj, 13 arĝentaj kaj 16 bronzaj medaloj, krome kun 90 kvaralokaj, 9 kvinalokaj kaj 10 sesalokaj klasigoj Hungarlando akiris la tre valoran 5-an lokon post Sovetunio, Usono, Germana Demokratia Respubliko, kaj Germana Federacia Respubliko en la ranglisto de la partoprenintaj landoj.

Ĉi-sube sekvas la detala vicigo de la hungaraj olimpikaj ĉampionoj, dua- kaj trialokaj klasitoj, laŭ la alfabeta ordo de la koncernaj sportobranĉoj.

1. *Akvopilkado.* La hungara akvopilko-teamo gajnis la arĝentan medalon, plenuminte ekscitoplenan kaj malfacilan matĉon kontraŭ la teamo de Sovetunio, kun la rezulto de 3:3. Nur la unu golon pli granda suma golkvanto de la soveta teamo alportis al tiu la ĉampionecon.

2. *Bokso.* György Gedó akiris la mondĉampionecon en la pezkategorio 48. Dualokan klasigon, do arĝentan medalon gajnis László Orbán en la pezkategorio 60 kaj János Kajdi en tiu 67. Trialokan klasigon atingis la 57-kilogramulo András Botos.

3. *Gimnastiko.* La hungara virina gimnasto-teamo elbatalis por si la valoran bronzan medalon post la teamoj de Sovetunio kaj Germana Demokratia Respubliko. Anikó Kéry, Krisztina Medveczky. Ilona Békési, Zsuzsa Nagy, Monika Császár kaj Márta Kelemen estis la membroj de nia gimnasto-teamo.

4. *Halterlevo.* Nia elstara halterlevisto Imre Földi fariĝis la olimpika ĉampiono de la pezkategorio 56 kun la suma 377,5 kilograma nova mond- kaj olimpika rekordo. La 52-kilogramulo Lajos Szűcs plenumis 330 kg-ojn por la arĝenta medalo, dum Sándor Holczreiter, János Benedek kaj György Horváth akiris trialokan klasigon respektive en la pezkategorioj 52, 60 kaj 82,5.

5. *Kajakado-Kanuado.* Tamás Wichman akiris arĝentan medalon en la konkurso de la 1000-metra solopa kanuado kaj gajnis same arĝentan medalon nia vira kajakdupo — József Deme kaj János Rátkai — en la 1000-metra distanco. Géza Csapó kaj f-ino Anna Pfeffer atingis trialokan klasigon respektive en la disciplinoj 1000-metra kaj 500-metra solopa kajakado.

6. *Lukto.* En la pezkategorio 82 de la liberstila disciplino ni gratulas al Csaba Hegedűs, kiu akiris titolon de olimpika ĉampiono kaj al la trialoka klasito, Ferenc Kiss en la pezkategorio 100. Krome tri hungaraj luktistoj, László Klinga, Károly Bajkó kaj József Csatári akiris bronzan medalon respektive en la pezkategorioj 57, 90, kaj 100 en la la klasikstila disciplino.

7. *Moderna pentatlono.* En ensemblo eksterordinare forta kun plej bona suma rezulto de la kvin disciplinoj venkis la eminenta hungara pentatlonisto András Balczó, elbatalante por si per tio la olimpikan ĉampionecon kaj kontribuante konsiderinde al la gajno de la arĝenta medalo fare de la hungara teamo, kiu krom li konsistis el Zsigmond Villányi kaj Pál Bakó.

8. *Naĝo.* En du disciplinoj eminentis nia elstara naĝistino Andrea Gyarmati, akirante dualokan klasigon en la 100-metra papilinaĝo kaj bronzan medalon en la 100-metra dorsonaĝo. András Hargittai gajnis bronzan medalon en la 400-metra vira miksonaĝo.

9. *Pafo.* Lajos Papp farigis trialoka klasito en la disciplino pafo per grandkalibra sportfusilo, kun sume 1149 cirklounuoj.

10. *Piedpilkado.* Post serio de gravaj matĉoj la hungara piedpilko-teamo sukcesis akiri por si la dualokan klasigon post la eminenta teamo de Pollando.

11. *Skermo.* Tiu sportobranĉo alportis por ni plej multe da sukcesoj kaj ĉiuj tri subbranĉoj estis reprezentataj en tiuj sukcesoj.

La plej brilan rezulton atingis niaj spadistoj, akirinte kaj la individuan ĉampionecon — en la persono de d-ro Csaba Fenyvesi — kaj la teaman ĉampionecon — d-ro Fenyvesi, Győző Kulcsár, Pál Schmitt, Sándor Erdős, István Osztrics —, kiun rezulton igas ankoraŭ pli valora la trialoka klasigo de Győző Kulcsár.

Du arĝentajn medalojn hejmenportis niaj rapiristinoj, la individuan: Ildikó Bóbis, kaj la teaman: ŝi kun Ildikó Rejtő, Ildikó Tordasi, Mária Szolnoki kaj Ildikó Rónai.

Same arĝentan medalon gajnis la dualoka klasito de la individua vira rapirado, d-ro Jenő Kamuti.

Por reprezenti ankaŭ la trian subbranĉon, Péter Marót gajnis arĝentan medalon en la disciplino sabrado kaj la sabroteamo — Péter Marót, Tibor Pézsa, d-ro Péter Bakonyi, Tamás Kovács kaj Pál Gerevich — atingis trialokan klasigon.

Tibor ÚJLAKY-NAGY

gyémántszemcsés köszörűszerszámok

diamantgrajnaj akrigiloj





Gyémántszemcsés fogászati korongok
Diamantgrajnaj dentistaj diskoj
„Rubidenta" galvánkötésű rubinkorund-szemcséjű fogászati korongok
„Rubidenta"-galvanadheraj rubenkorund-grajnaj dentisto-diskoj



GRANIT

FABRIKO DE FROTODISKOJ KAJ ŜTONVAZOJ

BUDAPEST, XIX. FADRUSZ JÁNOS UTCA 2.
TELEFONO: 471-118 TELEX: 3467 GRANIT BUDAPEST

CS
K GY
GRANIT

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

Antaŭ ĉio mi salutu la feniksan numeron (1972 — 1.) de NORDA PRISMO. Agrable estis preni en la manon la intim-aspektan, belpaperan, 64-paĝan revuon. Kortuŝis la adiaŭo al la tiel simpatia *Rose Szilágyi*, vidvino de la gazetfondinta *Ferenc* kaj, depost lia morto, honora redaktoro de NP. „Kun ĉiu, kiu ŝatis kaj amis ŝin, ni havas nun pri *Rozika* nur memoron. Al ĝi honoron!" — Koncerne la futuron, la ĉefredaktoro de la gazeto rigardas ĝin optimisme. Neniam malpraviĝu tiu ĉi optimismo! — *R. P. Nogeira* argumentas por tio, ke la E-a literaturo kapablas, almenaŭ teorie, „montri homajn tipojn en situacioj tipaj (partikulareco)", tiel ke per tio ĝi ilustras universalaĵojn. Mi povus kontraŭargumenti, sed lia teorio estas tiel alloge dezirinda, ke, prefere, mi rezignas pri tio. Rimarketo: la aŭtoro bazas sian tezon grandparte sur la studoj de Georgo *Lukács* (prononcu: *Lukaĉ*), kies nomon li skribas *Lukaks*. Jen la danĝeroj de la transskribo de propraj nomoj: rezultas nomo nek skribe nek prononce konforma al la originala. — *B. Ragnarsson* parolas pri la „du kodoj" kaj E-o; la du kodoj estas la „limigita" kaj la „ellaborita": la unua estas lingvaĵo uzata en rondo intima, la alia estas esprimmaniero uzata de edukitaj personoj en formalaj cirkonstancoj, ekz-e en grava konferenco. Nu, laŭ mia opinio ekzistas ankaŭ aliaj kodoj: la artisma kaj la kliŝ-ama; ĉi lasta estas la okazo, kiam simpluloj volas paroli iel „alte", kaj por tio helpas sin per multaj pretaj parolturnoj kliŝiĝintaj (kaj terure tedaj). La aŭtoro petas respondon ĉi-rilate je kvar demandoj, sed tia respondo, bedaŭrinde, ne trovas lokon en mia disponebla spaco. Aktivaj E-aj grupoj eble respondos utiligeble. — El la poemoj, multo intereskapta troviĝas en la japaneskoj de *Albert Goodheir* (Skotlando): *Edwin de Kock* ree surprizas min per sia kapablo: enŝteli en la koron de la leganto, kvazaŭ el inter la versoj, ian animvibron svagan, strange nostalgian. — La numero publikigas multajn recenzojn: tio estas kompreneble post la unujara paŭzo. *Clive Watkins* krude tradraŝas plurajn poemojn de *W. Auld*, sed, aliflanke laŭdas alten plurajn el ili. Tio, kompreneble, estas afero de gusto kaj aliaj certe havas guston alian. La recenzo, certe, estas farita en brila tono gratulenda. Tamen, du rimarkigojn: 1. Ĝi postulas „maloptimisman sed honestan kuraĝon" anstataŭ la grandaj gestoj de la antaŭa generacio. Tio estas: pesimismon kaj ironion anstataŭ entuziasmo. Nu, antaŭ ĉ. 20 jaroj ĉe ni, male, la optimismo kaj la entuziasmo estis devigaj. Miaopinie, ambaŭ devigitecoj estas malutilaj. Kaj eble pli malutila estas la deviga pesimismo-ironio, kiu finfine nutras cinikismon jam nun ekzistantan pli ol dezirinde. 2. Ĝi diras pri sardona poemo, ke por ties katastrof-antaŭvido ekzistas nenia kaŭzo, kaj du paĝojn antaŭe ĝi mencias „truojn, laŭ kiuj blovas vento, kiun akrigis kaj acidigis la terura historio de tiu ĉi jarcento". Ĉu inter la du lokoj ne troviĝas kontraŭdiro? — En la recenzo pri la „Aŭtuna foliaro" de *Baghy* mi legas, ke lia protesto kontraŭ la milito en Vjetnamio estas iom unuflanka. Ho ve! La poeto do estis *naiva* viktimo de propagando-kampanjo kiel la UN-ĉefsekretario Waldheim (laŭ sinjoro Nixon). — Mi ne povas ne mencii ankoraŭ la bone detalan recenzon de *J. C. Wells* pri PIV. Tamen ke E-o estas lingvo 90%-e nur legata, ĉi tiun tezon de Waringhien mi emus defendi. Tio ne signifas, ke oni neniam parolas la lingvon, sed, oni konfesu, ke tiuj paroloj, telefone aŭ en grupetoj, formas, evoluigas la lingvon en apenaŭ konsiderebla grado kompare al la gazetoj kaj literaturo.

Mi promesis, ke mi skribos pri la artikolo de *D. Dimitrijevic*-Russchitty, kiu en SENNACIULO okupiĝis pri la socialisma demokratio en sia maniero de kastelfarado en la aero. Tamen, tio fariĝis superflua, ĉar *Riĥter* en sia artikolo „Socialista Demokratio" (julia numero) donas bonegan respondon, eĉ se sen mencio de la artikolo de D. D. R. Riĥter realisme rekonas, ke la premiso de la socialismo estas la alsociigo de la produktofortoj, sed ke, kompreneble, tio ankoraŭ ne estas la plej alta ŝtupo de la socialismo. Li kuraĝas nomi la burĝan demokration formala kaj mencii la grandajn malfacilaĵojn, en kiuj troviĝas la socialismo-konstruantaj ŝtatoj, kiam ili klopodas krei la *veran, socialisman demokration*, en kiu la civitanoj estas sufiĉe kleraj por direkti sin mem kaj la socion. Mi estas scivola, kiel la aŭtoro estos atakata en la revuo.

En THE BRITISH ESPERANTIST, kiun mi jam laŭdis kiel tre legindan, *Dermod J. F. Quirke*, laŭ speciala komisio, ĉiumonate faras sian elefanto-dancon en la porcelan-vendejo E-ujo. Li ne nur atakas — inter aliaj — nian Akademion, sed diras ĝin tute nebezonata, eĉ NEBEZONATA. Nu. „Oni atakas la Akademion" artikolis en Literatura Mondo *M. Alice Pik* jam antaŭ pluraj jardekoj. Mi defendus la institucion per la sekvaj punktoj: 1. La antaŭparolo de la Fundamento antaŭvidas, preskaŭ preskribas tian „aŭtoritatan institucion"; 2. Se la Akademio mem, kiel kolektivo, ne faras gravajn laborojn, ĝi povas tiajn iniciati kaj ties rezultojn sankcii. 3. La ekzisto de Akademio kontribuas al la prestiĝo de la lingvo; 4. La titolo „akademiano" povas esti signo de distingo por tiuj, kiuj — senlace kaj senpage — multe laboris por Esperanto. Mi povus ankoraŭ daŭrigi la punktojn, sed mia spaco elĉerpiĝis.

POR NOMTAGOJ ○ NIKOLAO-TAGO ○ KRISTNASKO

fűszért

AĈETU

DESERTO-SPECIALAĴOJN EN LUKSAJ SKATOLOJ

DE LA BUDAPEŜTAJ NUTRAĴVENDEJOJ

ALFONSO PECHAN

Ano de la redaktoraro de Hungara Vivo fariĝis 70-jara. Lia nomo estas konata dise en Esperantujo. Tiun ĉi famon klarigas, ke en la pasinta jaro estis la 50-a datreveno de lia esperantistiĝo, kaj dum la duonjarcento — sur la tereno de Esperanto kaj ekster ĝi — li agadis tiom multflanke, ke eĉ resumi tion ne estas facile.

Alfonso Pechan naskiĝis en urbo Pécs. Post fino de mezlernejo li daŭrigis siajn studojn en la budapeŝta scienca universitato kaj ricevis diplomon kiel mezlerneja profesoro de matematiko kaj fiziko. De post 1920 li aktive partoprenas en la Esperanta vivo. Multaj el la samideanoj konfesas sin „disĉiplo de sinjoro profesoro Pechan". Li instruis kaj instruas en mezlernejoj, en diversaj kursoj, E-kluboj. Dum la jaroj 1935—45 Pechan estis prezidanto de la Hungara Esperanto-Pedagogia Asocio kaj ekde 1939 li prezidantas en la Landa Ekzamena Komitato. Multe li okupiĝas pri la organizado de ekzamenoj, esploras instru-metodojn.

La verkistan agadon de Pechan oni povas esprimi per unu vorto: signifoplena. Artikoloj hungaraj kaj esperantaj, tradukitaj kaj originalaj fontas el lia plumo. Plej volonte li okupiĝas pri leksikografio. Liajn ĉefverkojn reprezentas E-hungaraj vortaroj, turisma E-vortaro, Gvidlibro por supera ekzameno redaktataj de Pechan.

En la 51-a U. K. Pechan zorgis grandsukcese pri la Arta Festivalo. Lia ŝatata artobranĉo estas la muziko, tiom ke la „Pechan-kvarteto" — kies anoj estas liaj filoj — ludas ne nur „en hejma koncerto", sed ankaŭ publike.

Pechan ofte prelegas en E-kluboj pri lingvistikaj, instruadaj temoj kaj raportas pri siaj eksterlandaj vojaĝoj akompane de lumbildoj. Kelkfoje okazas, ke en la sama vespero li ĉeestas ankaŭ en du E-aranĝaĵoj, klubkunvenoj. (Maliculoj tion suspektas, ke sekrete li havas duulon.) Sed for la ŝercon! Alfonso Pechan estas nelacigebla, vizitas ne nur la ĉefurbajn grupojn, sed li vojaĝas tutlande por prelegi, instrui, ekzameni.

Okaze de la jubileo kun sincera amo ni deziras al Alfonso Pechan bonan sanon, forton, longajn jarojn laborajn por bono de Esperanto.

Ada CSÍSZÁR

Du personoj dumaniere pri tio sama

La usona polico-gazeto „National Police Gazette" ŝajne jam tediĝis de la multaj sekaj priskriboj de kriminalaĵoj. Aŭ se ne la gazeto, tiam ĝiaj legantoj. Tial ĝi publikigis nun artikolon tian, kiu tute kaj plene nenian rilaton havas al la kriminalistiko, sed estas kolorriĉa kaj interesas multajn. Iun sian kunlaboranton ĝi sendis al Gina Lollobrigida, la alian al Sophia Loren.

Al la du italaj mond-steloj ili metis demandojn laŭvorte tiajn samajn:

— Al kio vi povas danki vian grandiozan staturon? *Gina:* Tio ĉe ni estas familia trajto. *Sophia:* Al la spagetoj.

— Ĉu via staturo estis grava por via kariero? *Gina:* Ĝi helpis. *Sophia:* Ja nepre! Ĝi igis min konata. Tial mi ĝin dankas ĉiutage.

— Per kio vi rekonas, ĉu iu viro estas ĝentilhomo aŭ ne? *Gina:* En tio neniam mia instinkto min trompas. *Sophia:* Laŭ tio, kiel li min rigardas, kiam mi sidiĝas.

— Kiu estas la plej bela virino de la mondo? *Gina:* Aya Kutu Sodoney, tio estas virino neekzistanta. *Sophia:* La sfinkso.

— Kio estis la plej bela komplimento en via vivo? *Gina:* Kiam viro faris al mi edziĝ-proponon. *Sophia:* Foje profesoro longe esplor-rigardis mian vizaĝon, poste diris: Kia perdo por la arkeologio!

— Kio estas la plej malbona por virino? *Gina:* Fariĝi maljuna fraŭlino. *Sophia:* Esti malbela.

— Se vi devus inviti kvar stelojn en vian hejmon, kiujn vi elektus? *Gina:* Vittorio de Sica, Burt Lancester, Martin, Bette Davis. *Sophia:* Vittorio de Sica, Marlene Dietrich, Ingrid Bergman, Anna Magnani.

— Kio estis la plej malagrabla, kion iam oni diris pri vi? *Gina;* Kiam Sophia Loren deklaris, ke ŝi ne apartenas al miaj admirantoj. *Sophia:* Kiam Gina Lollobrigida min nomis Napola ĝirafo.

SZMR

HUMURO

— Vi faris kvarfoje rompŝtelon en la sama modvendejo... diru, kion vi ŝtelis?

— Mi ŝtelis, sinjoro polic-kapitano, nur unu solan kostumon por mia edzino, sed ŝi trifoje ŝanĝigis ĝin.

***

— Sed komprenu, fraŭlino — diras la matrikulisto —, mi ne povas vin edzinigi kun tiu ĉi viro, kiu estas komplete ebria.

— Kion fari, mi petas, se sobre li ne volas veni ĉi tien?

***

Geedza paro eniras lifton, en kiu troviĝas ankaŭ bela junulino. La edzino rimarkas, ke ŝia edzo faras amajn okulegojn al la knabino kaj klopodas proksimiĝi al ŝi. Per unu fojo la edzo ricevas de la knabino klakantan vangofrapon kaj ŝi diras indigne:

— Kiel vi kuraĝis min pinĉi?

Poste, la lifto haltas, la geedzoj eliras kaj la edzo diras embarasite al la edzino:

— Mi ĵuras, ke mi ŝin ne pinĉis.

— Mi scias — respondas la edzino —, estis mi, kiu ŝin pinĉis.

***

En Texas la kliento diras al la advokato:

— Mi deziras eksedziĝi. Kiom tio kostos?

— Okdek dolarojn.

— Ĉu vi freneziĝis? Por cent oni jam mortpafas ŝin.

UNUSOLA
CERAMIKAĴ-FAKVENDEJO
DE LA LANDO

AMFORA–ÜVÉRT

AMFORA KERAMIA BOLT

Pluraj centoj da ceramikaj
uzobjektoj
kaj ornamobjektoj

Jen loko, kie estas plezure
ĉirkaŭrigardi!

Budapeŝto, VII., Majakovszkij u. 1/d.

SÁNDOR WEÖRES

LA FEINO

Bela Bobela jen dancas,
rondo anĝela ŝin zonas,
ran-regimento flutetas,
grilo-brigad' violonas.

Bela Bobela petolas,
sorĉas flugila porkidon,
ĥisopromese ĝin rajdas,
fine donacas mokridon.

Bela Bobela masonas
el nebulkirlo palacon,
en ĝi regalas ŝi nanajn
gereĝidetojn, pajacon.

Bela Bobela nun dormas
jam sur aŭtuna folio,
par' de helikoj gardadas
pri ŝia sonĝ-idilio.

LA SERENADO DE JOHAĈJO LA PUPO

Krispa la lag' pro la blov' de zefir',
perlas lun-ilumino,
flugas birdete al vi la suspir',
dormi en dolĉo de l' sino.
Tremas en brust' aperta la stup',
pro vi ploras Johaĉjo la pup'.

Vundas ĉielon vi per okulpar',
vidu stelvojon, la vundan.
Por mi sufiĉas bukl' el harar'
pansi la vundon profundan.
Falas segajo, polvas la stup',
plu ne estos Johaĉjo la pup'.

Via spegulo estas la lun',
lipe krepuskoj ekbrulas,
dum mi malgajas ĝis frenezum'
kaj al vi trubaduras:
Brulos en mi la koro el stup',
pro vi mortos Johaĉjo la pup'.

Tr. *K. Kalocsay*

SÁNDOR WEÖRES, la multvizaĝa poeto, kiun ni prezentis per poemoj kaj provis karakterizi en nia numero 1970/3, nun montras en la supraj poemoj sian „facilan ludemon kaj freŝan porinfanan versbabilon".

Historia romano en Esperanto

Ĝoje ni povas raporti, ke unu el la interesaj historiaj romanoj de *Géza Gárdonyi* (1863—1923) estas presata E-e en la eldono de HEA, dank' al eksterlanda helpo amika. Tio samtempe solenas la jubileon de la „centjara Budapeŝto", kies „perlo en la Danubo", la Margareta insulo estas la okazejo de la roman-agado, kaj la 50-an datrevenon de la morto de l'aŭtoro.

G. Gárdonyi, iama vilaĝa instruisto, majstre priskribinta la vivon de la siatempa hungara vilaĝo, kreis en siaj historiaj romanoj valorajn pentraĵojn pri diversaj epokoj. Prave skribis pri li Kalocsay: „Li elektas grandajn okazaĵojn kiel fonon, sed en la „plen-aeron" li starigas la sorton kaj karakteron de sennomaj, malgrandaj homoj, kaj per vere majstra realisma arto li pripentras, kiel efikas je tiuj sensignifuloj la historiaj okazaĵoj."

Fakte en la „Nevidebla homo", romano pri la bataloj kaj morto de la huna reĝo Attila, erudita kortega skribisto estas tiu, kiu raportas ĉion, kvazaŭ li mem vidus la okazaĵojn. En la „Steloj de Eger", fama, dufoje filmigita romano pri la heroa triumfo de la fortikaj-defendantoj super la sieĝantaj turkoj, elleviĝas la figuro de la iama servutul-knabo fariĝinta kapitano. Kaj en la „Sklavoj de Dio", la nun presata romano, la ĉeffiguro estas frato Janĉi (Johaĉjo), juna monako, kamparanido bonmensa, iom naiva, sed portanta en si grandajn ideojn kaj grandan amon. Ne mirinde, ke antaŭ nelonge aperis ĉi tiu romano hungarlingve en populara represo de 50 000 ekzempleroj. Ni esperas, ke la E-a traduko de la romano, kiun la hungara literatoro *Antal Szerb* nomis „la plej bona hungara historia romano", vaste konigos ĉi tiun legindan legendon. Jes, ĝi estas kvazaŭ legendo: rakontas la puran, revan amon de kampuldevena monako al la reĝidino-monakino Margareta, pri kiu la insulo nun estas nomata. Siatempe, en 1908, la romanon oni atakis de du flankoj: unuparte pro tio, ke ĝi enhavas tro da spiritualismo, ke en ĝi Margareta gloriĝas je ia nacia martirino, ke en la figuro de Janĉi mankas „ia nobla sensismo"; aliparte oni akuzis la aŭtoron pri kvazaŭa sakrilegio, ĉar tia malgrandulo kiel Janĉi estas malinda je la amo de reĝidino, ĉar la aŭtoro donas misan prezenton pri la monakoj kaj precipe pri la monakinoj, „kvazaŭ li verkus sian libron por tio, ke ties leganto pensu la monakaron la plej malperfekta institucio de la mondo." Post la furora sukceso de la romano, tamen, la atakoj silentiĝis, ankaŭ de eklezia flanko oni parolis jam pri „historio pura, delikate punteca, tra kiu pasas vera poezio".

La esperantistoj povos legi la verkon en la bona traduko de *János Hamvai*, en lingvaĵo simpla, klara, senimplika, facile komprenebla.

P. BALKÁNYI

Hungara ekspozicio de avangardo en München

Sub titolo *Hungara avangardo 1909—1930* la Galleria del Levante de Milano aranĝis en München reprezentan ekspozicion en kunlaboro kun la „Kultura" kaj de la Hungara Nacia Galerio. Tiu ĉi ekspozicio estis nova signo de la interesiĝo kreskanta por la 20a jarcenta hungara belarto. Pri la sukceso de la ekspozicio estas karakterize, ke la aranĝanta institucio volas prezenti la materialon ankaŭ en Milano. La artaĵojn de la ekspozicio oni elektis tiel, por ke ili respegulu plej komplete — laŭ la ebloj — kaj en ĝia evoluado la historion de la hungara avangardo plena de revolucia elano kaj de faligiloj.

Virto de la ekspozicio estas, ke ĝi prezentis la artaĵojn trarigardeble, dividante al periodoj, aludante al la diversaj stilofluoj, kaj ĝi montris la internaciajn interdependojn de la hungara evoluado. En la jaroj de la elmigrado inter la du mondmilitoj pluraj hungaraj artistoj aliĝis al la internacia avangardo, kaj fariĝis ties gvidaj individuoj. Impona nomaro metas alten la lokon de la hungara avangardo en la hungara kaj eŭropa arto de tiu epoko: Aurél Bernáth, Sándor Bortnyik, Dezső Czigány, Béla Czóbel, Lajos Kassák, János Kmetty, Ödön Márffy, László Mednyánszky, László Moholy Nagy, József Nemes Lampért, Bertalan Pór, József Rippl Rónai, Lajos Tihanyi, Béla Uitz, Lajos Vajda — se ni vicigu nur la plej eminentajn.

LA BABELO DE LA SCIENCO

Interesajn indikojn pri la internacia labordivido kaj pri la pligrandiĝo de la kunlaborado en la scienca esplorado komunikas la Sciencorganiza Informilo. En 1860 funkciis entute kvar internaciaj organizaĵoj sciencaj. En 1962 ilia nombro, tiu de la rekonitaj organizaĵoj, jam estas proksima al 400; ĉi tiu nombro estas ĉirkaŭ 25 procentoj de ĉiuj tiaj organizaĵoj.

Ankaŭ rigarde al la internaciaj kongresoj kaj konferencoj, revolucia ŝanĝo okazis en la tempo-periodo post la dua mondmilito. La jara meznombro de la internaciaj renkontiĝoj plimultiĝis pli ol duobla jam en la ĵus pasinta jardeko: oni raportas pri meze 15 tiaj interkonsiladoj ĉiutage.

La plimultiĝintaj interrilatoj metas teknikajn problemojn. Tiaj estas unuavice la informado kaj dokumentado, kiuj fariĝas gravegaj demandoj, kaj kies solvon ankaŭ Unesko urĝas: t.e. la akordigo regiona kaj tergloba de la landaj sistemoj de dokumentado kaj informado, la normigo de la prilabor-metodoj de la dokumentado, la tipigo kaj normigo de la dokumentada metarialo.

La plimultiĝantaj interrilatoj faris grava tasko ankaŭ la evoluigon de la fremdlingvaj konoj da la esploristoj, estigon de tradukaj centroj, esploradon por la solvo de maŝina traduko, ellaboron de kod-sistemoj kaj formulaj lingvoj.

ZOLTÁN ZELK

SINJORINOJ EN KAFEJO

Sinjorinoj en kafejo
ĉe du tabloj kunŝovitaj,
ne kvin, kiel ĵus-semajne,
sed nur kvar, jam de tri tagoj
Povra Margit, povra Margit!
Ĝuste sepdek du ŝi aĝis,
eĉ ne tiom, nur aŭtune
iĝus ja sepdek-du-jara.
Sed kiel ŝi vivis, povra!
Tridek cigaredoj tage,
multaj dormigiloj, kaj la
koncentrej' en kvardek kvar.
Unu dam' la buŝon mute
malfermadas: ĉu do diri
aŭ ne diri tion? Fine
tamen ŝi eldiras: oni
el la edz' kuiris sapon.
Sinjorinoj en la tramo,
sinjorinoj en tombejo,
ĉe la disfalemaj randoj
de la tomb' farita nove.
Margit ne fariĝos sapo,
ŝin fidela kav' atendas,
ŝi, je l' tria tag', de tie
flugos supren edzo-trove.

Tr.: Márton FEJES



BHV

Turistoj povas aĉeti en Budapeŝto kontraŭ konvertebla valuto artaĵojn el porcelano, vitro, bronzo, metalo kaj ligno, krome lignoskulptaĵojn, malnovajn kaj novajn monerojn, medalojn — kun permeso de la Nacia Muzeo kun sendogana eksportado en la antikvaĵvendejoj

KONSUMTURIST

I., Hess András tér 3. (placo ĉe preĝejo Matiaso)
V., Hotelo Intercontinental-Pergola
VI., Avenuo Népköztársaság útja 27. (kontraŭ la Operdomo)
XI , Placo Szent Gellért tér 1. (Hotelo Gellért)

La artobjekto-ŝirmado kompensiĝas

Kvincent fakaŭtoritatoj de 48 landoj de Eŭropo, Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko partoprenis en la IIIa Kongreso de ICOMOS — internacia artobjekto-ŝirmado de UNESCO —, aranĝita nun en Budapeŝto. Tiel nun duoble pli da fakuloj kunvenis, ol en la antaŭa kongreso, aranĝita antaŭ tri jaroj en Oxford.

La artobjektoj estas tiaj organikaj partoj de la loksidiĝoj, kies sorto, restado aŭ pereo, ilia utiligo por tiaj aŭ aliaj celoj ne estas disigebla de la evoluado de la loksidiĝo. La urboevoluigo hodiaŭ jam eĉ ne estas imagebla sen priatento de la artobjektoj, kaj se inter la du faktoroj la harmonio estas strikta, el tio ĉiu povas nur profiti. La rapidega urbanizado kaj la saltosimila plialtiĝo de la materiala-teknika nivelo preskribas la rapidan kreskon de nombro de la loĝejoj. La laŭplana urboevoluigo pretendas la rekonstruadon de la eksmodiĝintaj partoj de la loksidiĝoj. Apud ĉi tiuj egaj taskoj la artobjekto-sirmado povus ŝajni por iuj personoj eble de luksa aŭ periferia karaktero. Ni mem konsideras, ke tiu aserto lamas, ĉar ni scias, ke ĉiu forinto elspezita por la artobjekto-ŝirmado — konsidere ankaŭ la spiritan energion —, pluroble kompensiĝas per tio, ke la artobjektoj savitaj por la futuro edukas la nunajn kaj venontajn generaciojn je respekto de la paseo, je flegado de la bonaj tradicioj, krome je konvena gusto kaj erudita pensado.

Inter artobjekto kaj moderna arkitekturo faŭkas multloke kaj ofte ravino. Ni mem havas la klopodon, ke la arkitektoj komprenu kaj ankaŭ praktike apliku tiun principon, ke inter la artobjekto kaj arkitekturo ne estas kontrasto: diferenco estas nur inter la bona kaj malbona arkitekturo. Kiome ni povis realigi tiun ĉi nian principon, la respondon donas al tio niaj konstruiĝintaj domoj — diris d-ro János Szabó, vicministro de la konstruado kaj urboevoluigo.

Ĉu ni estas malfacilaj?

En interparoloj pli malpli privataj, en grupkunvenoj kaj aliloke ne malofte plendas kelkaj, ke nia revuo estas tro malfacila. Tre volonte ni observus ĉi tiujn rimarkigojn, se ni scius konkrete, pri kio en ili temas, se la rimarkigoj ne estus faritaj tro ĝenerale.

Tial jene ni alvokas niajn legantojn, ke ili skribu al ni, ĉu vere la lingvaĵo de nia revuo estas malfacile komprenebla, kaj se jes, kio kaŭzas, laŭ ilia prijuĝo, tiun malfacilecon.

1. Ĉu la originalaj artikoloj mem estas stile aŭ enhave tro altaj aŭ la tradukitaj poemoj estas malklaraj? Last-rilate ni devas diri, ke nia tasko estas prezenti ankaŭ la nuntempan hungaran poezion tia, kia ĝi estas, kaj cetere, la poezio okupas en nia revuo nur tute modestan spacon.

2. Ĉu la traduk-lingvaĵo de niaj tekstoj estas malfacila, implikita, nur pene komprenebla por komencantoj? Ĉi-koncerne ni havus du proponojn.

a. En la esperantistaj grupoj oni povus teni specialajn HV-kunvenojn. En tiuj kunvenoj, okazantaj kelkan tempon post la apero de nova HV-numero, la grupanoj laŭtlegus la malfacilajn aŭ tute nekompreneblajn partojn de nia HV, notitajn dum la tralego. Iu lingva spertulo klarigus la nekomprenitajn aŭ nur pene digesteblajn tekstojn, priparolus ilin, eble la grupanoj proponus pli klarajn variantojn. Ni estas certaj, ke inter la partoprenantoj de tiaj kunvenoj kun la tempo pli kaj pli maldensiĝus la enigmaj tekstoj.

b. Oni ne domaĝu la penon — ni tre petas tion en nia komuna intereso — noti tiajn malfacilajn lokojn kaj sendi ilin al ni. Eble tio donus al ni okazon por priparolo de la ensenditaj tekstoj, por propono pri metodo de deĉifrado, kaj eble ankaŭ ni mem lernus de niaj legantoj, kiel esti pli simpla, pli senimplika, pli facile komprenebla.

Ĉi lastan proponon ni rigardas tre grava. Kaptu do vian globoplumon ĉe la eklego de la nova numero, notu la „pekajn" lokojn, por prezenti ilin lege en la grup-kunveno kaj skribe al nia redakcio. Ni forte kalkulas je tia speco de via kunlaboro kaj esperas de ĝi ne nur la supre nomitajn avantaĝojn, sed ankaŭ freŝan kaj fruktodonan rilaton inter nia revuo kaj niaj legantoj.

Ni atendas viajn leterojn!

H. V.

Ĉu plaĉas al vi HUNGARA VIVO?

Surprizu viajn amikojn: abonu por ili!

BONEGAJ TRINKAĴOJ — AGRABLA ETOSO

En restoracioj, bankedoj, en vendejoj petu la eksterlandajn trinkaĵojn

ARMENAJ KONJAKOJ

POLAJ KAJ SOVETAJ VODKOJ

BLANKAJ RUMOJ EL KUBO

Por donacado, konsumado aĉetu markhavajn trink-specialaĵojn

KARAKTERIZAJ AROMOJ

DELKER

EMINENTA KVALITO

R E C E N Z O J

Ujlaky-Nagy: La sporta lingvo en Esperanto

(Projekto). *Eldonis Hungara Esperanto-Asocio* 1972, 303 p. formato 140 x 190 cm.

Tibor Ujlaky-Nagy dum kvin jaroj preparis ĉi tiun studon, projekton, kaj nun en 500 ekzempleroj ĝin dissendis, petante rimarkojn kaj helpintencan kritikon.

La recenzanto, fakulo nek pri sporto, nek pri lingvistiko, kiel unu el la kvincent adresitoj povas nur esprimi privatan plezuron okaze de la apero — por disdoni tiun ĝojon al ĉiuj esperantistoj. Naskiĝis aŭ naskiĝas antaŭ niaj okuloj verko nepre bezonata; la intenco kaj la laboro estas vere valoraj kaj laŭdindaj.

La unua rimarko estas la rekono de la graveco de tiu laboro. Kvankam por ĝia sukceso nepre estas bezonata kunlaboro de multaj fakuloj sportaj kaj lingvistikaj, tamen la aŭtoro, prefere nomebla iniciatoro, faris grandegan laboron, metis vere bonan fundamenton.

Pri la ĝenerala strukturo de la verko ni citas la aŭtoron: „Por ne doni nuran sekan vortaron kun kelkvortaj klarigaj difinoj, la terminojn mi aplikis en konvena faka kunteksto, kiu estas taŭga ankaŭ doni la plej elementajn fakajn konojn pri la unuopaj sportbranĉoj kaj samtempe servas kiel modelo de la flua leĝera, skribe kaj parole facile uzebla, vivanta sporta lingvo. La elfiltrado de la terminoj el la kunteksto kaj ilia listigo estos jam la tasko de la vortaristoj."

La aŭtoro mencias ankoraŭ, ke: „— la studo havas la taskon servi nur kiel *fundamento* por la iom post iom eldonotaj apartaj faklibroj, traktantaj jam detale po unu sportbranĉon."

Kaj vere estas bezonata, ke tiun fundamentan verkon sekvu la apartaj nacilingvaj — aŭ plurlingvaj — fakvortaroj por la sportistoj mem, kiuj post mallonga kurso jam memstare povos uzi la fakterminarojn de iu aŭ alia sporta „disciplino". (Aparte ni ĝojas pri tiu esprimo, jam internacie uzata, kaj proponita por esprimi la plej malsuprajn subdividojn de certa sportbranĉo.) — Por ĝin klarigi la aŭtoro donas bonajn ekzemplojn, sed aliloke kelkfoje ni sentas mankon de glosoj, ekzemple legante: *trapa, sistemo* (ĉe diskopafo), *parati, asalto* k. s., la leganto povas nur konjekti la signifon. (Ja nek PV, nek PIV enhavas tiujn vortojn.)

Pri la sistemo, pri la apartaj ĉapitroj de unuopaj sportbranĉoj kaj disciplinoj ankaŭ ni atendas la opinion de la kompetentaj sportistoj kaj amatoroj. Tamen kelkajn ĝeneralajn rimarkojn ni mencias ankoraŭ.

Kelkaj esprimoj ŝajnas al ni hungarismoj, kiel ekzemple *„ellevitaj* konkursantoj" — por esprimi sportistojn aŭ teamojn kiuj havas la privilegion ne partopreni la selektajn ludojn; aliflanke ni ne povas konsenti, ke la aŭtoro proponas samtempe oficialajn kaj tn. „vulgarajn" esprimojn por certaj nocioj, sportbranĉoj. Ekzemple: ĉu vere estas necesaj la vortoj: piedpilkado, flugpilkado, korbpilkado anstataŭ: futbalo, volejbalo kaj basketbalo — jam internacie uzataj? Tiu esperantigo de sportaj esprimoj ŝajnas al ni superflua. Ĝi memorigas pri tio, kiam en la hungara lingvo oni klopodis ekzili la fremd-devenajn vortojn, kaj anstataŭigi ilin per hungaraj: tio sama okazis poste ankaŭ pri la sportaj terminoj kun lingvodefenda celo. Bone, sed en la internacian lingvon ni enkonduku la internacie jam uzatajn vortojn.

Malgraŭ la ĵusaj rimarkoj ni povas nur saluti la aŭtoron de „La sporta lingvo en Esperanto" — kiel iniciatoron de grava, grandioza, jam delonge atendita laboro. — Kaj ni atendas ankaŭ la baldaŭan efektivigon de iniciatita verko-serio kun gratulo kaj bondeziro.

Ro-Lo

„La tuta Esperanto"

Pasintjare aperis ĉi tiu utila gramatika helplibro, eldonita de Sofia Distrikta-urba Komitato de Bulgara Esperanto- Asocio.

Henrik Seppik, la aŭtoro, helpas ekkoni „la misterojn" de lingvo tra amaso de ekzemploj kaj kontraŭekzemploj. Tion li faras klare, simple, bone kompreneble, tiel li dokumentas, ke Esperanto havas neniom da „misteroj", sed — kiel ĉiu alia lingvo — ankaŭ ĝi havas proprecon, kiu devenas el la simpla logikeco de la lingvo.

Laŭ la opinio de Zamenhof „la vera stilo Esperanto estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas — aŭ devas esti — nur stilo simpla kaj logika".

La estona aŭtoro ĉi tiun opinion kompletigas: „Kio estas nelogika, komplikita kaj malklara, tio estas malbona, kvankam oni eble ne pekas kontraŭ gramatikaj reguloj. Por havi bonan, elegantan kaj internacian stilon, oni devas bone koni la lingvon kaj ĝian spiriton, oni devas havi la kapablon pensi logike kaj rektlinie, kaj oni ne rajtas blinde imiti sian gepatran lingvon."

Al ĉiu ni povas proponi la libron de la kompetenta aŭtoro.

—gng—

„Esperanta legolibro"

Aperis en kvina eldono reviziita kaj pligrandigita; ĝin eldonis la Itala Instituto de Esperanto. *Elio Migliorini* el riĉa materio elektis — abunde, kaj li dividis tiun triparte. La unua parto (Tra la vivo): enhavas proverbojn, anekdotojn, legendojn, fabelojn, rakontojn; en la dua parto (Tra la lingvo) ni trovas: studojn, deklaraciojn, opiniojn, konsilojn pri la lingvo kaj lernado ekz. de L. L. Zamenhof, E. de Amicis, E. Privat, J. Baghy, I. Lapenna, Th. Cart, Collinson; la tria parto (Tra la literaturo) entenas: rakontojn, novelojn, poemojn de eminentaj esperantistoj kaj ne- esperantistoj (en eminentaj tradukoj).

La 253- paĝa libreto estas eleganta; ĝi havas bone legeblan tipografion. Ni volonte legus multajn tiajn eldonaĵojn, ĉar la plej multaj esperantistoj parolas la lingvon ankoraŭ ne tute perfekte.

—gng—

LA FESTO ESTOS PLI AGRABLA, SE VI AĈETAS VIAN DONACON EN

DOMUS

MAGAZENO POR LOĜEJ-INSTALAĴOJ.





En granda sortimento estas riceveblaj tablo- kaj starlampoj, lustroj, tap.ŝoj kun tradicia kaj moderna ornamdesegno, murtapiŝoj, etmebloj.

DOMUS

Budapeŝto, XV. Rákospalota,
Sipos Dénes u. 9—11
Malfermi'a:
labortage inter 10—18 horoj
sabate inter 10—15 horoj.
Alveturo per aŭtobusoj
de n-roj 25 kaj 70.



LETERKESTO

„... Viaj literaturaĵoj kaj priartaj artikoloj, via hungara ĉarmo, kiu tiel evidentiĝas ĉie en la revuo — ĉiuj ĉi tiuj kaj aliaj ecoj tro multnombraj por listiĝi, faras vian revuon la plej bona kaj plej respektinda en Esperantujo. Mi bedaŭras diri, ke la via estas eble la sola, kiun ni havas, kiu rajtas esti komparata eĉ kun la altrangaj nacilingvaj revuoj de la sama speco.

Aŭ ĉu mi eraris tie... ĉar nenie troviĝas alia revuo de ĝuste la sama speco kiel la via. *Hungara Vivo* estas unika, kaj mi dankas al vi, ke vi provizas la eblecon al mi kelkfoje ĝui la jaro (sed ne sufiĉafoje) naĝi en la oceano de la hungarumado..." — Allan E. Fineberg, Usono.

„Mi vere sentus min malfeliĉa sen ricevado de ĉi bela kaj enhavriĉa E-a periodaĵo... via N. Fedotov, USSR."

„... Ĉu mi deziru, ke via revuo estu altnivela, enhavriĉa, instrua, distra, lingve kaj stile senriproĉa? Ĝi ja havas jam tiujn ecojn! Mi deziras do al ĝi nia tutmonda movado kaj al ĉiuj landaj asocioj, ke ili posedu samkvalitajn, samvalorajn eldonaĵojn, kiel via „Hungara Vivo". — Teodoro Löwenkopf, Israel.

„Mi pensas, kiel multaj aliaj esperantistoj, ke estas tro malmulte aperigi tiel bonkvalitan revuon nur kvarfoje en jaro. Certe ĝi meritus aperi ĉiumonate." — Venda Löiv, Estonio, USSR.

„Mi rekomendas vian revuon ankaŭ en nia lando kaj al miaj geamikoj en diversaj landoj." — Bohumil Král, ČSSR.

„Korajn gratulojn pro via dekjara ekzistado!" — Maria Grochowska, Pollando.

„Ju pli mi legas H. V.-n, des pli mi ŝatas Esperanton. Pere de la franca peranto, mi abonigis italan esperantiston! Mi esperas helpi al disvolviĝo de H. V." — A. Bongars, Francio.

„Mi tute konsentas kun aliaj legantoj: vere estus tre dezirinde, se „Hungara Vivo" povus aperi almenaŭ dumonate." — Nadia Andrianova, USSR.

„Kun grandega ĝojo mi legis en la lasta leterkesto la „ĝojigan informon". Kvankam informas nur pri plano kaj estas skribita en kondicionalo, tamen mi esperas, ke la revuo aperos sesfoje jare, same bela kaj enhavriĉa, kiel nun." — Julio Szabó, Rumanio.

„Elkore mi gratulas al ĉiuj kunlaborantoj de „HV" okaze de la fino de la unua deko kaj deziras por la dua deko multe da sukceso kaj ĉion bonan! Vivu la „Hungara Vivo!" — Ilse Neŭmann, DDR.

„Sincere salutas vin kaj deziras multajn sukcesojn al la ŝatata kaj ĉiam malpacience atendata revuo, via amiko el Sovetunio: Viktoro Arolovič".

„Akceptu salutojn kaj bondezirojn el Anglio." — Paul Hewitt.

Al la samideanoj, kiuj sendis al ni leterojn dum la lastaj monatoj, kaj helpis nin kun bondeziroj, konsiloj, rimarkoj, la redaktoraro diras sincerplenan dankon.

Krom la supre cititaj letersendintoj ni tutkore salutas ankaŭ la sekvantajn: *Vajnay Árpád*, Hungario; *Valdis Gullis*, Latva SSR; *Istotin Konstantin Stepanovič*, USSR; *Rikardo Perkowski*, Pollando; *Saulcerite Neilande*, Latva SSR; *Jaan Ojalo*, Estona SSR; *Adolf Stanura*, ČSSR; *Viktor Milicin*, USSR; *Termes Sándor*, Hungario; *Kozi Sato*, Japanio; *Teodoro Kulagin*, USSR; *Anna Gerőfy*, Rumanio; *Antoni Hala*, Pollando; *Telek Balázs*, Hungario; *Johannes Palu*, Estona SSR; *Petro Polišĉuk*, USSR; *Marie Bartovská* ČSSR; *Gimelli Germano*, Italio; *Zoltán Marenčin*, ČSSR; *G. B. Tordoff*. Anglio;

Pluan fruktodonan kunlaboron deziras inter la legantoj kaj la redaktoraro

Hungara Vivo

KORESPONDI DEZIRAS

Bulgario: — MLADEĴKI DOM — Sekcio ESPERANTO, s-ino Stojanka Solakova, *HASKOVO*, — serĉas korespondkontaktojn kun aliaj E-junularaj sekcioj interŝanĝante fotojn k ajnan materialon por ekspozicioj; intergastado de grupoj, sciigo pri E-kursoj k.a.

Ĉeĥoslovakio: — Jaroslav Palán 18-j., interŝanĝo de bildkartoj, pm., turist. kolor. prosp., glumarkoj, gazetoj, libroj: *PELHŘIMOV*, Chvojnov 20, ČSSR.

Francio: — 20 francaj lernejoj dez. organizi KOLEKTIVAN korespondadon por siaj lernantoj (de 9 ĝis 12-j.). Informas: LENTAIGNE, 3, rue de la Gaillarde, 34 — *Montpellier*.

Germana Demokratia Respubliko:
— Edgar Möller 31-j. laboristo interesiĝas pri pm., bk., E-revuoj, turismo, folkloro: 27 *Schwerin*, Dr. Hans-Wolf. Str. 24.

Rumanio: — Alex.—Bubu Tausciuc, str. 23 August 39, *Sulina*, jud. Tulcea: pri pm. kun filatel. familioj.

Sovetunio: — V. Andrejev, juna inĝeniero serĉ. koresp. amikojn el Okc. Germanio, Francio, Usono: Abonkesto 98, Centro, *Čeliabinsk* 454 000. USSR.

— Šilaikyté Aŭdrone 17-j. lernantino, pri pm., bk., fotoj de aktoroj, muziko: *Pušyno 59*, Panevežys, Litova SSR.

— Ljuda Barsova 24-j. studentino, pri esperantaĵoj, libroj, insignoj: *350 039 Krasnodaro*, Vavilova 17, kv. 14.

— Leo Činaev 32-j. inĝeniero, E-e, ruse, angle pri E-movado, artoj, antikva tutmonda historio, fiziko, astronomio, lingvoplanoj: *353 890 Primorsko-Aĥtarsk*, Krasnodarskogo kraja str. Kosmonavtov 196.

— Jūraté Karalkevičiūté 20-j. studento, pri muziko, sporto, kol. pm. k ludilojn: *Kaunas 28*, Vydūno I—I, Litova SSR.

— Rita Kretavičiūté 17-j. knabino, Kedainiu, Rajonas 235 051, Dotnuva—Akademija, Parko 12—20, Litova SSR.

— 16—18-j. e-istoj, pri div. temoj. Skribu al la instruisto: Johannes Palu, pošte restante, *200 016 Tallinn*, Estona SSR.

— Algis Šepuraitis 19-j, pri muziko, bk.; *232 000 Vilnius*, P. R. Litova SSR.

— Nova adreso de Anja Vojnarovič: 353 860, Priazovska pošto, Primorsko-Aĥtarska rajono, Krasnodarska lando, USSR.

Usono: — Allan E. Fineberg, 76 Seventeenth Avenue, Paterson, N.J. 07 513: dez. kor. nur per magnetofonaj bendoj, ĉu bobenaj ĉu kasetaj.

Pri Literatura Mondo



La ĉefaj vicoj de nia enigmo koncernas la faman revuon. Ensendi sufiĉas la solvon de vicoj : 1., 8., 24., 99., 100. horizontalaj; kaj 1., 14., 17., 44., kaj 50. vertikalaj. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALAJ VICOJ: 1. Ĉefkunlaboranto de nia revuo, estis ankaŭ tiu de Literatura Mondo. „Baptopatro" de L. M. 8. *Unu el „Naŭ Poetoj", sovetiano.* 15. Heroo de Shakespeare-dramo. 16. Rabobesto kun artikolo. 18. Batilo el ŝnuro aŭ rimeno. 19. Delokig' per frapo. 21. Elmetu ion al necerto. 22. Antikva suba vest'. 23. Tabelvorto. 24. *Tiun antologion eldonis L. M. en 1934.* 27. OA 28. Baptonomo de EATON, Usona aktivulo, pacbatalanto. 29. Malgranda mambest' ĉasata pro sia felo. 30. Kunfiksos du pecojn metalajn. 32. RSA. 34. Kromo. 35. Valora metalo. 36. LH. 37. Plata malbonodora insekt'. 39. Ege. 40. Reen: sufikso signifanta malsanon. 42. Persona pronomo. 43. Horo, horloĝo — germane. 44. Sama, kiel 29-a 45. *„Sinjoro ..." : novelo de Baghy, premiita dum la IX — a Int. Floraj Ludoj ; ankaŭ L. M. aperigis ĝin.* 49. Milito — angle. 51. Firme restanta ĉe sia propra opinio (radiko) 52. Cent — en pluraj slavaj lingvoj. 53. Balkana land'. 54. Ekzemple : ebur' (radiko de kunmetita vorto). 57. Minerala kavforma mas'. 60. Prahistoria epoko. 61. Granda nekulturita ebenaĵ'. 63. Alproksimiĝ' sin movante en akvo. 65. Vegetaĵo el fam. de umbeliferoj (Pimpinella anisum) 66. Duono, mezo de io — itale. 67. UD; 68. Identaj vokaloj. 70. Mallongigo de diplomitoj. 71. Tralasi likvaĵon (radiko). 72. Radiko de vico 35. horizontala. 73. Ano de Usona religia sekto. 76. Abstrakta kaj ĝenerala ide'. 78. Internacia prefikso signifanta kontraŭecon. 79. Usono. 81. Ag' fandfari feron. 82. Fil' de Dedalo. 83. Certa terspac'. 85. Apartigo de la aliaj. 87. Eltrovinto de telegrafo. 88. Sufikso. 89. Dramo de Ibsen, aperis ankaŭ en E-a traduko. 92. AT. 93. Miksata ino! 95. Persona pronomo. 96. Fil' de frato. 97. ED. 98. Kvanto da tempo pasinta ekde naskiĝo. *99. Sveda esperantisto, verkisto,: gajnis premion ĉe romankonkurso de L. M. pro sia verko : „Homoj sur Tero"* 100. *Novelaro de J. Baghy, eldonis P.E.A.*

VERTIKALAJ VICOJ : 1. *Kreinto de eldonejo L.M., multe oferis por la revuo.* 2. *Asocio de Esperantistaj Libro — Amikoj, fondita de L.M.* 3. Surkampa vegetaĵ' genro de kompozitoj. 4. *Hungara verkisto, L.M. aperigis lian novelon en traduko de Bodó (1878—1933).* 5. NL. 6. Jardoj kaj kortoj — en angla lingvo 7. La plej granda osto de la kokso. 8. Urbo en Malio (Sokolo). 9. Unu el la pseŭdonomoj de Majstro! 10. TO. 11. Ujo por enteni ovon. 12. Ne min! 13. Narkota substanco, ekstraktata el suko de papavo. 14. *La plej granda hungara romanverkisto; L.M. aperigis lian novelon en traduko de Bodó (kun komenclitero de beptonomo — Maŭrico)* 17. *Konstanta rubriko estis en L.M.* 20. Mok', ridiga, amuza diraĵo. *22. De 1924 la eldonon de LM transprenis Hungara E-a Instituo, kun gvido de Vincento...* 25. *Latva poeto, kontribuis al la poemaro troviĝanta ĉe vico 24. horizontala (kun komenclitero de baptonomo)* 26. Aro da tulipoj. 28. *Sveda esperantisto, estis kunlaboranto de LM, poeto, tradukisto.* 31. *Fondinto kaj la unua eldonisto de LM poste responda redaktoro (Teodoro).* 33. ... maŝino: kudromaŝino 38. Azia ŝtat'. 41. Konjunkcio uzata post komparativo. 42. Artikolo. 44. *Triakta dramo de Karinthy, trad. Kalocsay; LM eldonis ĝin en 1923.* 45. Parto el kemio! 46. *Angla verkistino, kunlaboris en LM per artikoloj pri Shakespeare.* 47. Kosto de partopreno en komuna ago 48. Reen: instrumento 50. *Poemaro de Kalocsay, eternigis la famajn esperantistojn de tiuj tempoj (aperis en 1931 ĉe LM)* 55. ... mo: aro da ludantoj por sporta konkurso. 56. Miksita trinkaĵo! 58. LM funkciigis ankaŭ aktivan... 59. *Fama franca karikaturisto, LM prezentis liajn karikaturojn.* 61. Apartaj partoj, fakoj. 62. Versa fabelkolekto de Kalocsay, aperis en 1956 ĉe KOKO. 64. Ekstrema plezuro. 66. Ne vin! 69. Numero. 71. ... Angeles: 74. RTR. 75. Servisto de Ĥlestakov en „La Revizoro". 76. Demandvorto en akuzativo. 77. EKR. 80. Kvarpieda, longorela ŝarĝbest'. 81. Batalil'. 84. Filo de frato. 86. Organ' de aŭdkapablo. 87. Ag' formi el moligita materio plastikan objekton. 90. Reen: poseda pronomo. 91. Trinkaĵo. 94. Sufikso, esprimanta agon. 98. Sufikso esprimanta kolekton.

F E R I

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 72/2 (sub titolo: Nia jardeko) estis:

Horizontalaj: Kökény — Babela aventuro — J. Baghy — Kórach — Mátéffy

Vertikalaj: Kalocsay — Babits — Bálint — Tárkony — Benczik

Libropremion gajnis: Bárta František (Zilina Gorkého sad 2) el *Ĉeĥoslovakio;* E. Purina (Sverdlovsk — L 14, Malyseva N 29—5) el *Sovetunio;* Lászlóné Bognár (Győr, 111. Kert u. 4) el *Hungario.*

Ĝustan solvon ensendis ankoraŭ: F-ino N. Hanson el *Anglujo;* Atanas Gaev el Bulgario; Ales Bednařik kaj Adolf Staňura el *Ĉeĥoslovakio;* Andre Bongars el *Francio;* Christel Brauer, Jürgen Berndt, Franz Peter Kurtz, Ernst Muthschall, Ilse Neumann, kaj Dr. Karl Schulze el *GDR;* J. Kondor, kaj M. V. Waldowski el *GFR;* Szilárdné Bálint, Imre Balogh, Ferenc Bartók, István Bodnár, Ferenc Deák, Ferenc Egry, Józsefné Gasztonyi, Dro József Homoródy, Béla Hubay, József Kardos, Ildikó Kerékgyártó, Tivadar Keszthelyi, Anikó Kiss, József Kiss, Zsigmondné Kovács, Lenke Kun, Károly Magyari, Lenke Markó, Béla Medgyes, Bernadette Mihályi, Margit Nagy, Lajos Niederfriniger, János Podani, Károly Ságvári, Károly Törtely, Sándor Varga, kaj András Wágner el *Hungario;* Teodoro Löwenkopf el *Izraelo;* Maria Grochowska kaj Krzysztof Garncarz el *Pollando;* Julio Szabó el *Rumanio;* Viktoro Arolovič, Valdis Gulbis, Rein Kiviaru, Johano Palu kaj Aleksandr Vajsberg el *Sovetunio.*

ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62,P. O. Box 149. — Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 3,—

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AŬSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A — 1200, WIEN I. Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A — 1011, WIEN I.

AŬSTRALIO: Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltd., Caixa Postal 63366, SAO PAULO. Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH. The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slawejkov SOFIA

ČEĤOSLOVAKIO: P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. — dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ĈINIO: Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD. Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81. Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib., Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que. Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjenste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechatj, Import, Prospekt Mira 112—a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028. Corvin Travel and Gift cond Ave. NEW YORK Parcel Service. 1590 Se- 10028.

Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21 — 105, C. 24. CARACAS

VJETNAMIO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 32-a paĝo!

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

XII-a jaro, 1972. 4-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*

Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*

Lingva revizio: *K. Kalocsay*

Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, D-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la kvina horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.

Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro Ft 32,— al eksterlando krome Ft 6,40 por afranko.

72.2110 Békés megyei Nyomdaipari Vállalat, Gyula
Indexszám: 25.377

MEDICOR MEDICOR MEDICOR MEDICOR MEDICOR MEDICOR MEDICOR MEDICOR

MEDICOR BUDAPEST

Miniatura jonizatoro
MEDICOR

Certigas la etan negativan jon-supernombron en la aerspaco de aŭtomobilo.

Ĉiaj efikoj: kreskas la sango - PH (bazeca proporcio-ŝanĝo)
malaltiĝas la sangotensio,
malpliiĝas la oksigenkonsumado de la organismo,
pliiĝas la diseriĝo de serotonino ktp.

Resume: la negativa jon-efiko montras psikologie trankviligan influon al la vegetativa nervosistemo ekonomiiganta la vivprocezon.

Jonizatoro: kreskigas la kapablon por koncentrado,
plibonigas la ĝeneralan farton.

Medicor jonizatoro estas vendata de la etkomercaj vendejoj de Aŭto- kaj Maŝinparto-komerca Entrepreno. (Autó- és Alkatrészkereskedelmi Vállalat)

Ricevebla por 6 kaj 12 voltoj.

HUNGARHOTELS

HUNGARHOTELS

HUNGARHOTELS

HUNGARHOTELS

HUNGARHOTELS

HUNGARHOTELS

INFORMATION

Budapest V., Petőfi Sándor utca 16
Tel.: 383-117, 180-642 Telex: 22-4923

HUNGARHOTELS

HUNGARHOTELS

HUNGARHOTELS

HUNGARHOTELS

HUNGARHOTELS

HUNGARHOTELS